



IL POPOLO CINIO

中國報道

1

1985





Vespera suno ĉe maro

de ŬANG ŬENBO

Enhavo

Al legantoj: EPC salutas vin	68
Raportajoj pri ekonomia reformo: Ĉongĉing provanta urban ekonomian reformon	2
Uverturo de la reformo	2
Entreprene rompinta egalismen	6
Modelo de industria reformo	8
Viglas komercoj	10
Esperanto:	
Ĉinaj esperantistoj-sciencistoj pri Esperanto	21
La Esperanto-Ligo por Norda Ameriko alrigardas la estontecon	24
Du bukadoj el la manoj de Tibor Sekelj	28
ESP-Novaĵoj	27
Tibeto hieraŭ kaj hodiaŭ: Tibeto, la sudokcidenta limregiono de Ĉinio	48
Malfermita urbo: Jantaj — perlo de Ĝjaŭdong	16
Agrikulturo: Eksperimentado de “ekologia agrikulturo”	58
Literaturo: Somera travivaĵo (Novelo)	40
Ĉinaj virinoj: Ĉinaj kamparaninoj hodiaŭ	36
Socia problemo: Vojo de malliberulo	45
Vojaĝo tra Ĉinio: Antikva urbo Pekino	31
Historia objekto: Ding-o	56
Enciklopedieto de Ĉinio: Termofontoj de Ĉinio	39
Kultura interŝanĝo: La Bavaria Stata Opertrupo de FR Germanio en Ĉinio	66
Internacia problemo: Ekonomia prosperiĝo en la azia kaj pacifika regiono	63
Kurantaj aferoj	61
Sur la kovrilo kaj dorskovrilo: Potala-palaco en malproksimo	
Interne de la kovrilo: Vespera suno ĉe maro	
Interne de la dorskovrilo: La Sveda printempo; Sunleviĝo ĉe Mylestom	

JARABONTARIFO		Francio	FF	60.00	Japanio	Yen	2 000.00	Usono	US\$	10.00
Aŭstralio	\$A	FR Germanio	DM	18.00	Jugoslavio	Din.	300.00	Kanado	Can\$	10.00
Britio	£	Hispanio	Pts	900.00	Nederlando	Gld.	22.00			
		Italio	Lit	11 000.00	Portugalio	Esc.	700.00			
Por aliaj landoj en Eŭropo:	£	5.00	US\$	8.00	Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:	£	2.80	US\$	4.00	

ĈONGĈING PROVANTA URBAN EKONOMIAN REFORMON

En la lastaj jaroj la mirakla ekonomia impeto de la urbo Ĉongĉing vekis grandan atenton de aliaj urboj de Ĉinio. En la frua aŭtuno de 1984 ni sendis tri raportistojn al la loko por informiĝi pri tio. Dum unu monato ili navetis tie inter urbaj institucioj, grandaj kaj malgrandaj stratoj, fabrikoj, entreprenoj . . . kaj malkovris, tra aŭtuna pluvnebulo, la sekreton de la ekonomia flugo de tiu ĉarma monturbo.

La Red.

Uverturo de la reformo

de LAJ HAJLONG

GRAVECO DE ĈONGĈING

“Ĉongĉing estas kvazaŭ fluoresko-ekrano, sur kiu ĉiuj aliaj grandaj urboj de Ĉinio povas vidi sian ombron,” diris Ljaŭ Bokang, la dua



Ljaŭ Bokang, antaŭiranto en reformo

estro de Ĉongĉing, kiam li akceptis nian intervuon en la urbodoma kunvenejo.

S-ro Ljaŭ kun nigrakadraj okulvitroj diris al ni: “Ĉongĉing estis unu el la gravaj industriaj urboj de Ĉinio kaj nun la plej granda ĝenerala industria bazo en sudokcidenta Ĉinio. Ĝi estas havenurbo ĉe la kunfluejo de la riveroj Jangzi kaj Ĝjaling en la mezo de la lando, kaj pro tio ĝi havas iujn karakterizaĵojn kaj superecojn de la urboj marbordaj kaj landinternaj.”

S-ro Ljaŭ naskiĝis en Ĉongĉing. Lia rakontado montris lian bonan konon pri la urbo kaj lian grandan entuziasmon por disvolvi ĝian ekonomion.

Li daŭrigis: “Ĉongĉing kun relative riĉaj fontoj de energio, akvo, mineralo kaj agrikulturo taŭgas por ĝenerala disvolvo de la ekonomio. Ĝi havas fortan ekonomian bazon kaj, kiel granda urbo, okupas la kvinan lokon laŭ la fiksa aktivo kaj la okan lokon laŭ la produktovaloro. Ĝi havas preskaŭ ĉiujn ĉefajn branĉojn de la moderna in-

La doko Cai-tjanmen



dustrio kaj certan kapablon de produktado kaj administrado. Ĝuste pro tio Ĉongĉing havas gravan signifon por esplori vojon por la urba ekonomia reformo en Ĉinio kaj disvolvi la ekonomion de la ĉina sudokcidenta regiono.”

Februare de 1983 la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio decidis, ke Ĉongĉing la unua provu ĝeneralan reformon de la ekonomia sistemo. Post pli ol unu jaro ĝi jam akiris bonan sperton. De 1984 Ĉinio rapidigis siajn paŝojn en reformado de la urba ekonomia sistemo. Post kiam 24 urboj de Ĉinio komencis ĝeneralan reformadon, decido por rapidigi reformadon de la tuta ekonomia sistemo ĉefe en la urboj estis farita en la antaŭ nelonge finita Tria Plena Sesio de la Dekdua Centra Komitato de KPC.

GRAVAJ RIMEDOJ

Traktante malbonajn aspektojn de la malnova sistemo kaj sukcesan sperton pri la urba reformado de Ĉongĉing, s-ro Ljaŭ Bokang, kiu studis ekonomikon en alternejo en la kvardekaj jaroj, faris klaran resumon:

Unue, kiel centra urbo en sudokcidenta Ĉinio, Ĉongĉing mem postulas unuecan organizaĵon de produktado kaj cirkulado kun la urbo kiel la centro pro siaj ekonomiaj aktivadoj. Sed en la pasintaj jaroj Ĉongĉing estis regata de la provinca registaro kaj ne havis rajton mem fari eksteran komercon nek kunlabori rekte kun aliaj provincoj kaj urboj. Tio multe katenis ĝin, kiu havas grandegan latentan forton en industrio.

Due, la malnova urba ekonomia sistemo ne prenis la socialismajn entreprenojn kiel relative sendependajn produktantojn kaj administrantojn de komercaĵoj. En la administrado ĝi estis tro severa al ili, ke ili ne havis memstarecon por fari relative sendepandan administradon gvidatan de la ŝtata plano, dume en la ekonomia respondecado ĝi estis tro indulgema al ili. Post necesa dealkulo ĉiuj netaj profitoj de la entreprenoj, ĉu multaj ĉu malmultaj, devis esti donitaj al la ŝtato kaj defecito estis kovrata de la ŝtata financo, kaj la entreprenoj ne bezonis porti difinitan rigoran ekonomian respondecon por la ŝtato. Estis tute egale, ĉu oni laboris bone aŭ malbone, kaj ĉiuj entreprenoj povis manĝi el la “granda poto” de la ŝtato. En la distribuado egalismo anstataŭis la socialisman principon “al ĉiu laŭ lia laboro”. Tio forte subpremis la labor-entuziasmon de oficistoj kaj laboristoj.

La malnova administra sistemo emfazis organizaĵon de ekonomio laŭ administraj distriktoj, sistemoj, ŝtupoj kaj rimedoj, kio kaŭzis apartiĝon de departementoj kaj tiun de urboj, ripeton de dislokiĝo de entreprenoj kaj superfluan transportadon de krudmaterialoj kaj produktaĵoj. Ekzemple la Tria Ferŝtala Fabriko de Ĉongĉing provizas la Poŝtan kaj Telekomunan Fabrikon per ŝtalo. Nur malpli ol kvar kilometrojn distancas inter si la tenejoj de ambaŭ fabrikoj. Sed laŭ la malnova regulo unue oni devis transporti la ŝtalon al tenejo kelkcent kilometrojn fore, kaj poste nur la koncerna administracio rajtis distribui ĝin al

ĈONGĈING PROVANTA URBAN EKONOMIAN REFORMON

la Poŝta kaj Telekomunika Fabriko. Post la irareira transportado la kosto de unu tuno da ŝtalo altiĝis de 700 al 900 jŭanoj.

En la cirkulado, dekelkaj distribuaj stacioj gvidataj de la provinco kaj dekelkaj entreprenoj sub la regado de la urbo samtempe ekzistis en Ĉongĉing laŭ la malnova sistemo. Ili agis aparte, sen harmonia kunlaboro.

Rilate al tiuj malbonaj aspektoj, la magistrato, subtenate de la Centra Registaro, komencis plenan reformadon al la ekonomia sistemo de la urbo. La ĉefaj rimedoj estas:

1. Post sankcio de la Centra Registaro oni levis la ekonomian administran povon de Ĉongĉing de la nivelo de urbo al tiu de provinco por plene disvolvi ĝian rolon de centra urbo.

2. Por la urbaj entreprenoj dono de profito al la ŝtato estos iom post iom anstataŭigita per imposto-pago, kaj en impostokolektaj leĝoj klare difiniĝos la rilato inter la ŝtato kaj entreprenoj, ke la entreprenoj vere fariĝu relative sendependaj ekonomiaj entoj kaj produktantoj kaj administran-

toj de la socialismaj komercaĵoj, kiuj mem respondecas pri siaj profitoj kaj perdoj. Interne de la entreprenoj oni praktikas la respondecan sistemon de laŭkontrakta produktado por intime ligi la ekonomian respondecon kun la ekonomiaj intereso de laboristoj kaj oficistoj kaj venki egalismen en la distribuado.

3. Laŭ la fakoj, produktaĵoj kaj teknologio oni starigis en la urbo 64 industriajn kompaniojn. Ili ellaboras sian disvolvan planon, helpas fabrikojn reguligi produktaĵan strukturon kaj krei novajn produktaĵojn, organizas fabrikojn por teknika renovigo kaj faka kunlaboro kaj industrian kaj komercan kombinaton. Tio povas levi la laborofikon de la entreprenoj. Nun tiuj kompanioj faras pluan reguligadon por pligrandigi sian administran memstarecon.

4. Por ŝanĝi la malnovan sistemon en cirkulado, oni establis en la urbo komercan centron de industriaĵoj, fondis 16 distribuajn bazarojn de industriaĵoj, 9 sintezajn kaj fakajn distribuajn bazarojn de agrikulturaj kaj kromokupaj produktaĵoj, plimultigis vendejojn por senpera vendo.

Parto de Ĉongĉing



Tio multe simpligis la distribuan procedon de komercaĵoj kaj sekve vigligis la urban kaj kamparan merkatojn.

Ĉongĉing ankaŭ akiris ĝojindan sperton en esplorado de kombino de la urboj kun la kamparo, multflanka disvolvo de akva transportado sur Jangzi-rivero kaj utiligo de fremdaj kapitaloj por reformi la ekzistantajn entreprenojn.

KONTRAŬDIROJ EN LA REFORMADO

S-ro Ljaŭ montris, ke la reformado ege profitigis Ĉongĉing ekonomie. En 1983 la urbo plenumis la jaran enspezan planon je unu monato antaŭdate kaj je 10.1% pli multe ol en 1982. La enspezo de januaro ĝis septembro 1984 pli multiĝis je 12% ol tiu en la sama periodo de 1983.

La reformado alportis ekonomian flugon kaj ankaŭ tuŝis diversajn malbonajn aspektojn de la ekzistanta ekonomia sistemo kaj estigis povo-ŝanĝojn de diversaj ekonomiaj organizoj kaj reguligon de la ŝtataj, kolektivaj kaj individuaj intereso-
soj. Tio sekvigis neeviteble novajn kontraŭdirojn. La diversnivelaj gvidantoj nepre devas re-

sumi novan sperton por solvi novajn problemojn.

Kontraŭ burokratismo la magistrato de Ĉongĉing faris jenan decidon: Ricevinte instrukci-petan skribon de bazaj unuoj, la gvidaj organoj devas doni respondon en 14 tagoj. Se ne, la bazaj unuoj rajtas agi laŭ sia propra volo. Se estos malbona sekvo, ĝin devas porti la koncerna gvida organo, kiu ricevis la instrukci-petan skribon. Tio multe altigis labor-efikon kaj evitis prokrastadon. Krome la urba magistrato instalas malferman telefonon de la urbestro, kaj la urbestro traktas la telefonaĵojn de urbanoj en difinita tempo, tiel ke multaj problemoj povas trovi rapidan solvon.

Dum nia tri-hora interparolado s-ro Ljaŭ montris bonan humoron. Li diris, ke la reformado estas enhavoriĉa kaj interesa kaj ĝiaj ekzemploj kaj spertoj kortuŝaj. Estas necese profunde studiti tion teorie. Multaj problemoj estas esplorataj ne nur en Ĉongĉing, sed ankaŭ en aliaj lokoj de la lando. La reformado de Ĉongĉing estas nur uverturo de la ĉiuflanka reformado de la tuta Ĉinio.

Bambuplektaĵoj en foiro



Entrepreneo rompinta egalismom

de ĈEN BAŬHE

EN la monturbo Ĉongĉing, la Fabriko de Specialaj Staloj, same kiel aliaj fabrikoj, troviĝas en ĉirkaŭpreto de montoj. Frumatene, sekvanse senfinan fluon da aŭtomobiloj, mi veturis norden laŭ Ĝjaling-rivero por viziti tiun metalurgian entreprenon reformatan.

PROFITIGA KAJ POR ŜTATO KAJ POR ENTREPRENO

Kun 16 000 laboristoj kaj oficistoj, la fabriko, starigita en 1935, situas je 30 km. for de la urbaj distriktoj. Ĝi disponas nur vicon da malnovaj unu-etaĝaj domoj kiel siajn centrajn oficejojn. La direktoro de la fabriko iris kunveni en Pekino, kaj anstataŭ li min varme akceptis ĉefingenero Ĝou, ĉirkaŭ 60 jarojn aĝa, kun grizaj haroj ĉe la tempioj. La ĉefingenero entuziasme prezentis al mi la reformadon, kiu disvolviĝas en la entreprenoj de Ĉongĉing.


“Ekde 1949 ĉinaj entreprenoj estas ĉiam investitaj de la ŝtato, kaj ili produktas kaj liveras siajn profitojn al la ŝtato. Tiu praktiko havas seriozajn mankojn,” diris la ĉefingenero. Li resumis la mankojn jene: 1) Ĉe la difinado de profitokvoto entreprenoj ofte marĉandas kun la ŝtato; 2) La entreprenoj havas sur si nenian ekonomian respondecon por la ŝtato: kiam ili malprofitas, la ŝtato subvencias ilin por daŭrigi produktadon; 3) La entreprenoj havas sur si nenian juran respondecon rilate profito-liveradon, ili ofte prokrastas


la transdonon de sia farita profito al la ŝtato; 4) La preskribo liveri tutan profiton al la ŝtato katenas la aktivecon de la entreprenoj en produktado. Tia praktiko karakteriziĝas per egalismo, kaj oni figure nomas ĝin “manĝado el la sama granda pota”.

La ĉefingenero daŭrigis: “En la kuranta reformado, anstataŭ ke la entreprenoj liveras siajn profitojn al la ŝtato, la ŝtato impostas ilin pere de koncernaj leĝoj kaj regularo, kaj per tio oni efike ŝtopis la supre menciitajn mankojn. Unue, tio garantias, ke la enspezo de la ŝtato stabile kreskos kun la kreskado de la profitoj de entreprenoj. Due, laŭ la eksplicita preskribo de la ŝtato, post pago de impostoj, la restaĵoj de la profitoj apartenas al entreprenoj mem, kaj la ŝtato ne plu subvencias, kiam entreprenoj malprofitas, tiel ke la entreprenoj sentas premon sur si kaj samtempe vidas perspektivon de profito-gajno.” Kun tiuj vortoj li kore ekridis.

La ĉefingenero Ĝou estas veterana eksperto de la ĉina ŝtala industrio. Per la ŝanĝiĝo de la fabriko en la lastaj du jaroj li konvinkis min, ke la anstataŭigo de profito-liverado per impostado favoras kaj la ŝtaton kaj la entreprenojn. En 1983, la unua jaro de la nova praktiko, la sumo imposte pagita de la fabriko al la ŝtato estis 81.8-pocente pli granda ol la profito liverita al la ŝtato en 1982, kaj post pago de la impostoj la leĝe retenita profito de la fabriko estis 71.2-pocente pli granda ol tiu en 1982. En la unuaj naŭ monatoj en 1984 la fabriko imposte pagis al la ŝtato je 3 200 000 jŭanoj pli multe kompare kun la sama periodo en 1983. En la pasintaj du jaroj la enspezo de laboristoj kaj oficistoj de la entreprenoj meznombre altiĝis 7.8-pocente ĉiujare. Krome, ekde 1983 la fabriko, per leĝe retenitaj profitoj, konstruis por siaj laboristoj kaj oficistoj loĝdomojn kun plankareo de 20 000-30 000 kvadrataj metroj. La ĉefingenero emfaze aldonis: “Kun la sistemigo kaj leĝigo de impostado, nun la entreprenoj vere sentas forton, kiu ĝin premas kaj urĝas.”

Muldejo de la fabriko





Preparado de ŝtalaj ingotoj

El lia parolo mi vidas, ke la entreprenoj ja ne plu povas “manĝi el la sama granda pota” de la ŝtato. Sed ĉu ankaŭ la problemoj interne de la entreprenoj estas jam solvitaj? “Ne, ankoraŭ ne,” senhezite respondis la ĉefinĝeniero. “Se entrepreno deziras bone disvolviĝi, ĝi devas rompi alian grandan poton, nome, la egalismon en distribuado interne de si.”

PLI DA PAGO AL PLI DA LABORO

Forlasinte la centrajn oficejojn, mi veturis al la Instituto de Precizaj Alojoj. La instituto, kiel unu el la branĉoj de la fabriko, kapablas fari kaj produktadon kaj sciencan esploron kaj estas la unua en la fabriko, kiu praktikas la ĉiuf flankan kontraktan respondec-sistemon.

La trafiko en la fabriko estas tre oportuna, ŝoseoj ligas la centrajn oficejojn kun ĉiuj laborejoj. Survoje mi vidis plurajn konstruejojn kun impone starantaj turgruoj. De la junulo Hŭang, kiu min akompanis komisiite de la fabriko, mi informiĝis, ke tie konstruiĝas loĝdomoj por laboristoj kaj oficistoj. La investaĵoj por la konstruado plejparte venas de la fabriko. En la lastaj du jaroj, la fonduso de laborejoj kreskis, kaj ankaŭ ili komencis investi la konstruadon por plibonigi la loĝ-kondiĉon de siaj laboristoj kaj oficistoj. Ekzemple, la muldejo jam konstruigis por si 7-etaĝan loĝdomon. Ankaŭ la unua laminatejo kaj la dua afinaciejo kune investis similan konstruadon.

La Instituto de Precizaj Alojoj troviĝas inter montoj. Liŭ Keŝjang, la estro de la instituto, estas mezaĝa viro, malgrasa sed energio-plena. Julie de 1984, en la nomo de la instituto li subskribis ĉiuf flankan kontrakton kun la fabriko, surbaze de detala enketo kaj analizo pri la produktaj kondiĉoj kaj latentaj kapabloj de la instituto. La kontrakto, valida por du jaroj, difinas, ke la instituto liveros al la fabriko profiton de 4 000 000 jŭanoj ĉiujare, kaj la restaĵo, post pago de impostoj al la ŝtato, apartenos al la instituto.

Liŭ Keŝjang min sciigis, ke laŭ la rajto difinita en la kontrakto li reorganizis la kadrojn sub la instituta nivelo. La instituto kontrakte disdonas labortaskojn al ĉiuj fakoj, la fakoj siavice al ĉiuj grupoj kaj la grupoj al ĉiuj laborpostenoj. Ĉiu ekonomie respondecas por la tasko de la supera nivelo. La instituto kaj fakoj havas rajton de rekompenco kaj puno. Por ĉiu laborposteno oni difinas detalajn normojn por mezuri la laboron de laborantoj. La estro diris: “La ekonomia kontrakta respondec-sistemo karakteriziĝas ĉefe per klare difinita respondeco, reala rajto kaj certigita profito-gajno. Ĝi rompis la egalismon en distribuado de la pasintaj jaroj.”

En la pasinta aŭgusto la rekompencoj por la laboristoj kaj oficistoj de la instituto forte diferencis inter si. Kiuj laboris bone, akiris 40 jŭanojn, kiuj ne bone, nur 4 jŭanojn. Nove poste-nigita administra oficisto de la instituto diris al mi, ke la junaj laboristoj, kiuj ne laboris bone en

la pasinteco, nun aktivas en sia laboro kaj, iafoje por plenumi sian taskon, eĉ volonte laboris post siaj deĵoraj horoj. Por eviti la interrompon de produktado, laboristoj kaj oficistoj de la ripara fako riparis la ekipaĵojn de la instituto en festotagoj. Mi informiĝis, ke dank' al la leviĝo de entuziasmo en laboro rezulte de la nova praktiko, la totala profito de la instituto en la lastaj tri monatoj pliiĝis je 630 000 jŭanoj kompare kun tiu en la antaŭaj tri monatoj.

En la Fabriko de Specialaj Ŝtaloj oni povas trovi ankaŭ aliajn formojn de la ekonomia kontrakta respondec-sistemo. Iuj laborejoj prenas rekompencan el sia profito laŭ la proporcio kontrakte difinita. Sed malgraŭ la diverseco de formoj, la celo estas sama, nome, enkorpigi la socialisman principon de distribuado — “distribuado laŭ laboro kaj pli da pago al pli da laboro”.

LA RAJTOJ DE LA DIREKTORO

En centra oficejo de la fabriko mi vidis sep dekretojn subskribitajn de la direktoro dum la periodo de julio ĝis septembro en 1984, nome, dum la unuaj tri monatoj, post kiam la fabriko komencis praktiki la sistemon de plena respondeco de direktoro. La enhavo de la dekretoj koncernas la nomumon, eksigon kaj transpostenigon de dekelke da laborej-nivelaj kadroj.

Kiajn rajtojn la direktoro de la fabriko efektive havas? Tion eksplicite difinas dokumento,

kiun mi vidis en la fabriko. Laŭ la dokumento la direktoro ĉefe rajtas direkti produktadon, nomumi aŭ eksigi laborej-nivelajn kadrojn, instali administrajn organizaĵojn en la fabriko, rekompenci aŭ puni la laboristojn kaj oficistojn ktp.

La ĉefo de la direktora oficejo diris al mi, ke dum la longa pasinteco al ĉinaj entreprenoj mankis decido-fara povo en produktado kaj administrado, kaj la rajtoj de la gvidantoj de entreprenoj estis limigitaj. Tial, unu el la gravaj enhavoj de la urba reformado estas grandigi la decido-faran povon de la entreprenoj. Li sciigis min, ke nun la fabriko kaj ĝia direktoro jam havas multe pli grandan rajton. Ĉiujare la direktoro rajtas altigi je 1-2 gradoj la salajron de 3% de la laboristoj kaj oficistoj. Se la jara profito de la entrepreno kreskas pli ol 7-pocente, la direktoro rajtas ankaŭ altigi je unu grado la nefiksitan salajron de 20% de la laboristoj kaj oficistoj per la retenita profito. (Se la koncernaj laboristoj kaj oficistoj laboras bone en la sekvantaj tri jaroj, la altigita parto de la nefiksita salajro povas aldoniĝi al la fiksita salajro.) La fabriko nun havas la rajton vendi siajn superplenumitajn produktaĵojn kaj altigi aŭ malaltigi iliajn prezojn interne de amplekso de 20%. Ĉe la fino li diris: “Antaŭ nelonge nia direktoro deklaris, ke ĉiuj laboristoj kaj oficistoj povas ĝui libertagon en sia naskiĝtago. Ankaŭ tio ja estas la rajto de la direktoro!” Ĉe tiuj vortoj, kaj li kaj mi ekridis.

Modelo de industria reformo

de LAJ HAJLONG

DISVOLVIGANTA FABRIKO

De la urbo Ĉongĉing mi veturis norden 69 kilometrojn laŭ Ĝjaling-rivero kaj atingis la Puling-an Maŝinfabrikon. Antaŭe ĝi estis malgranda, tamen, en la lastaj du jaroj ĉirkaŭe de la fabriko oni faras grandskalan konstruadon. Sinsekve leviĝas kinejo, sportejo, klubejo kaj loĝdomoj por laboristoj; la polvoplenaj tervojoj estas anstataŭitaj de cementaj vojoj kaj ĉiuj laboristoj portas novajn

blondajn uniformojn, kion oni vidas nur en granda fabriko.

Mi eniris en laboristan hejmon kaj estis varme akceptata de paro da mezaĝaj geedzoj. La hejmo estis provizita per novaj mebloj kaj elektraj aparatoj, kiel ekzemple, televidilo, elektra ventumilo, lavmaŝino ktp. La serena mastrino gaje diris al mi, ke ili pretas aĉeti radiomagnetofonon, sed ili ne trovis portempe ŝatatan specon.

Tie vere okazas granda ŝanĝiĝo. Kvankam videblas el la restintaj malvastaj kaj kadukaj fabriksdomoj la antaŭa malriĉeco de la maŝinfabrika Puling, tamen la bazo de novaj konstruaĵoj prezentas ĝian brilan estontecon.

NOVA VIVECO


“La fondiĝo de la ekonomia kombinato alportis vivecon al Puling,” diris al mi sagaca kaj talenta vicestro de la fabriko kun forta ŝanhaja akcento, en nove ornamita luksa kunvenejo.

Vicestro He plenumis diversajn funkciojn en la fabriko kaj estis trejnita en iu universitato de Ĉongĉing. Lia detala prezentado donis al mi profundan impreson pri la disvolviĝo de la Puling-a Maŝinfabriko en la lastaj jaroj.

La Puling-a Maŝinfabriko antaŭe estis la Ŝanhaja Motorofabriko. En decembro de 1964, tiu ĉi malgranda fabriko, kiu havis nur 480 laboristojn, kune kun aro da fabrikoj de Ŝanhajo translokiĝis en sudokcidentan Ĉinion por helpi la tian konstruadon. Tiam la ĉefa tasko de la fabriko estis produkti malgrand-ĉevalpovajn benzinmotorojn por agrikulturo. Poste ilia merkato malgrandiĝis tagon post tago pro pli kaj pli vasta uzado de grandtipaj agrikulturaj maŝinoj. En 1980 la fabriko dronis en depresio, ke ĝi produktis en tiu jaro nur 78 motorojn, kaj la deficiito atingis 550 000 jŭanojn. Tiele la fabriko funkciis ekskluzive depende de subvencio de la ŝtato.

Por helpi la Puling-an Maŝinfabrikon eliri el la malfacila situacio, la magistrato de Ĉongĉing aktive kontaktiĝis kun koncernaj fakoj. Dank’ al la helpo de la magistrato, en la 26-a de septembro, 1980, la fabriko aliĝis al la Ĝjaling-produktomarko.

La ĉefa linio de muntado en la Ĝjaling-a Maŝinfabriko



La produkta linio de benzinmotoroj de la Puling-a Maŝinfabriko

ka Motorcikla Ekonomia Kombinato kun la Ĝjaling-a Maŝinfabriko kiel la ĉefa parto.

La ekonomia kombinato revivigis Puling. La maŝinfabriko Puling en nur unu trimestro finplenumis la preparadon por komenci produktadon de malgrand-ĉevalpovaj motoroj bezonataj de Ĝjaling-motorciklo. En 1981 ĝi produktis pli ol 40 000 motorojn kaj la profito atingis 636 000 jŭanojn. Ĝis 1983 (inkluzive) la fabriko produktis jam 158 500 motorojn kaj la profito atingis 2 879 000 jŭanojn. Oni planas produkti en 1984 120 000 motorojn. Kun prosperiĝo de la produktado senĉese leviĝis la vivnivelo de la laboristoj kaj oficistoj, kaj ilia meznombra enspezo kreskis 40 procentojn.

EKZEMPLO DONITA DE ĜJALING

Jam en la Puling-a Maŝinfabriko mi aŭdis pri Sun Ŝoupeng, estro de la Ĝjaling-a Maŝinfabriko. Oni diris, ke iufoje li deklaris al respondeculoj de la kunlaboraj fabrikoj, ke por pli solidigi la ekonomian kombinaton li pretas dediĉi sian vivon al

produktado de Ĝjaling-motorcikloj. Poste, akcidento ja trafis lin: Por ekzameni la kvaliton de produktaĵoj, li lernis veturigi motorciklon. Foje lia motorciklo koliziis kontraŭ arbo. Tamen feliĉe estis, ke li negrave vundiĝis kaj kuŝis en hospitalo unu monaton. Post elhospitaliĝo li daŭre persistis en la lernado kaj finfine sukcesis.

Bedaŭrinde, en la fabriko mi ne renkontis tiun romanecan personon. De alia respondeculo mi sciigis, kiel la Ĝjaling-a Maŝinfabriko suriris sur la vojon de solida produktado sub la gvido de Sun.

La Ĝjaling-a Maŝinfabriko estas granda entrepreno de pli ol 40 jaroj. En 1980, pro nesufiĉeco de produkta tasko, plejparto de la produkta kapablo de la fabriko ne estis utiligata, tiel ke ĝi malprofitis je pli ol 9 000 000 jŭanoj. Por sin liberigi el tiu pasiva situacio la fabriko decidis produkti novajn specojn. Por plenigi la mankon en la enlanda merkato, ili provfaris motorciklon de tipo Ĝjaling CJ 50 kaj baldaŭ komencis pogranda produktadon. Tamen, Ĝjaling-motorciklo konsistas el pli ol 1 500 pecoj, faritaj per sufiĉe fajna prilaborado kaj kompleksa teknologio pri metalurgio, mekaniko, kemio, elektraj instrumentoj kaj plasto. Uzante siajn nekompletajn ekipaĵojn la fabriko unujare produktis nur 2 500 motorciklojn, tial okazis granda deficiito. Tio komprenigis ilin, ke por radikale ŝanĝi la situacion necesas serĉi kunlaborantojn, specialigi la produktadon de pecoj de motorciklo kaj iri la vojon de kunigita produktado.

Tamen, en la tiama ekonomia sistemo estis multaj reguloj nekonformaj al la produkta disvolvado, tial aperis la situacio, en kiu nenia interhelpo kaj interrilato troviĝis inter la entreprenoj centraj kaj lokaj, ŝtataj kaj kolektivaj. Kuraĝigate de la politiko vigligi la ekonomion, gvidantoj de la magistrato de Ĉongĉing, fabrikestro Sun kaj aliaj aktive faris reformon por rompi neraciajn limigojn, finfine organizis ok trans-regionajn kaj trans-fakajn entreprenojn en ekonomian kombinaton kaj praktikis kunigitan produktadon.

Kunigita produktado postulas malmultan investon, tamen donas altan profiton jam post mallonga tempo. Laŭ nekompleta kalkulo, por fondi motorciklan fabrikon kun jara produktokvanto de 150 000 motorcikloj estas bezonataj kelkdek milionoj da jŭanoj kiel investo kaj la konstruado daŭros tri jarojn. Sed, la afero estis tute alia ĉe la ekonomia kombinato: en tri jaroj post la fondiĝo de la kombinato oni per nur 3.5 milionoj da jŭanoj konstruis ĝin en la plej grandan motorciklan produktejon de Ĉinio. Ĝi produktis pli ol 220 000 motorciklojn kaj pagis al la ŝtato imposton de kelkdek milionoj da jŭanoj, kaj laŭ la plano en 1984 ĝi produktos 200 000 motorciklojn.

Min mirigis la vizitado en la maŝinfabrikoj Puling kaj Ĝjaling, ke la ekonomia kombinato montris gigantan ekonomian efikon. La metodo de la maŝinfabriko Ĝjaling estas paŝon post paŝo plivestigataj en la reformo de la ekonomia sistemo en Ĉongĉing. Sendube, tia nova industria strukturo servos kiel nova modelo por la industria reformo de la tuta Ĉinio.

Viglas komercoj

de ĈEN BAŬHE

EKDE la 50-aj jaroj, Ĉinio praktikas en la komerco jenan cirkulan sistemon de varoj: La ĉefajn produktaĵojn oni devas liveri al la ŝtato kaj poste la ŝtato distribuas ilin pogranda al podetalaj vendejoj laŭ tri administraj niveloj. Tiu sistemo ludis gravan rolon por garantii la provizadon, stabiligi la merkaton kaj varprezojn en la pasinteco, kiam la varoj ne estis sufiĉaj. Sed en la pli

ol 30 jaroj la ekonomio de Ĉinio multe disvolviĝis kaj multe da novaj ŝanĝiĝoj aperis en la merkatoj en urboj kaj kamparoj. Ekzemple, nemalmultaj konsumaj industriaĵoj, kies provizo ne povis kovri la bezonon en la pasinteco, pli kaj pli alproksimiĝas al la ekvilibro inter provizo kaj bezono. Kaj iuj produktaĵoj eĉ multe superas la bezonon kaj jam fariĝas malfacile vendeblaj. Ankaŭ en la cir-

La vendhalo de metalaĵoj kaj elektraj instrumentoj en la foira domo



kula sfero de varoj, la situacio monopoligata de la ŝtata komerca sistemo estas rompita kaj aperas vigla kaj konkura situacio de plurspecaj ekonomiaj fortoj kaj entreprenaj manieroj. En la nova situacio, la malnova cirkula sistemo de varoj fariĝas ne plu taŭga. Reformo estas la sola vojo. La urbo Ĉongĉing faris efikan provon ĉi-flanke.

DIREKTORINO

En la reformo de komerca sistemo famiĝas la Horloĝa kaj Okulvitra Kompanio de Ĉongĉing kaj ĝia direktorino Ĝaŭ. Ŝi aĝas 55 jarojn. De 1979, subtenate de supera instanco, ŝi gvidis la butikon, kiu siatempe vendis podetale nur horloĝojn kaj okulvitrojn, kaj provis trovi novan vojon de komercado.

La direktorino parolas lakone kaj agas rapide. Ŝi senkaŝe konigis al mi ilian reformon: "Pasintecce, ni povis ricevi varojn nur el la urba magazeno. Ni vendis tion, kion ĝi liveris al ni. La profito estis malmulta, kaj cetere la varoj malfacile kontentigis la bezonon de la klientoj. Por fari reformon, ni unue devas mem serĉi varfontojn kaj vendi tiujn produktojn, kiujn aliaj butikoj ne volas vendi." Ŝi daŭrigis: "La brakhorloĝoj kun la fabrikmarko Ŝanĉeng de la Brakhorloĝa Fabriko de Ĉongĉing estis iam malfacile vendeblaj kaj la urba magazeno ne volis aĉeti ilin, tial la fabriko falis en malfacilecon de kapitala cirkulado. Ni aĉetis nombron da brakhorloĝoj kaj anticipis pagis 40 000 jŭanojn por helpi la fabrikon solvi la malfacilon. Per tio nia vendejo faris bonan servon al

klientoj kaj trovis merkaton por la brakhorloĝo Ŝanĉeng." Si diris ankaŭ, ke la pasinta pogranda liversistemo ne povis kontentigi la bezonon de la amasoj. Ekzemple, kamparanoj de la provinco Siĉŭan preferas oritan brakhorloĝon, la nacimallimultaj popolanoj de la provincoj Junnan kaj Gujĝoŭ brakhorloĝon kun kolora ciflerplato. Sed pasintecce oni vendis nur brakhorloĝojn kun blanka ciflerplato, kiuj ne plaĉis al la tieaj amasoj kaj vendiĝis malmulte. Informiĝinte pri tio, ili iniciative konsiliĝis kun koncernaj fabrikoj, ke ili adaptu la produktadon al la merkata bezono. Dank' al tio la amasoj kontentiĝis, kaj la vendejo kaj fabriko pliigis sian profiton.

En 1981 tiu butiko jam fariĝis kompanio kaj komencis fari pograndan vendon. Ĝi vendas ne nur facile vendeblajn varojn sed ankaŭ malfacile vendeblajn, kaj faras pograndan vendon tute laŭ la deziro de aĉetantoj, tial multaj horloĝfabrikoj iniciative vendas siajn produktaĵojn al ĝi kaj podetalaj butikoj volonte aĉetas pogranda de ĝi varojn. Iu direktoro de horloĝa fabriko en la provinco Ŝanŝji laŭdis: "Ĝi faris bonegan aferon por la disvolvo de la horloĝa industrio."

FOIRA CENTRO DE INDUSTRIAJOJ

Ne longe post kiam mi atingis Ĉongĉing, mi jam aŭdis, ke lastatempe stariĝis pli ol 60 foiraj centroj, inter kiuj la plej granda estas la Foira Centro de Industriaĵoj. Iutage mi ĵurnaliste vizitis ĝin kun granda intereso.

ĈONGĈING PROVANTA URBAN EKONOMIAN REFORMON

La Foira Centro situas en la urbo. Oni faris fondaĵon preparon en 1983 kaj ekfunkciigis ĝin oficiale en januaro de 1984. En la sepetaĝa foira domo troviĝas sep fakoj de ĉiutagaj varoj, kulturaj bezonaĵoj, tekstilaĵoj, trikotaĵoj, elektraĵoj, metalaĵoj kaj kemiindustriaĵoj. Tutjare iras tie negocoj de diversaj komercaĵoj, vendiĝas aŭ ekspoziciĝas industriaĵoj de Ĉongĉing kaj aliaj lokoj de la tuta lando.

En ĉiuj haloj de la domo mi vidis vigran negocan aktivadon: Iuj interparolis pri negoco kun laborantoj, aliaj observis kaj diskutis sortimenton, triaj subskribis mendilon kaj faris pagon ĉe la oficejo.


En la fako de ĉiutagaj varoj en la unua etaĝo mi renkontiĝis kun du aĉetistoj de iu mineja komerca kompanio, kiuj elektis kaŭĉukajn botojn. Ili diris al mi, ke ŝtataj kaj kolektivaj vendejoj aŭ individuoj kun negoca licencilo povas pograndede aĉeti varojn en la centro, ne limigate de malsamaj regionoj kaj gildoj. Ili diris ankaŭ, ke la prezoj de varoj en la centro estas ŝanĝeblaj kaj interkonsentitaj laŭ la kvalito de varoj kaj la aĉetita kvanto.

En la tria etaĝo estis fako de tekstilaĵoj, kies diversaj koloroj plezurigis la rigardantojn. Mi min turnis al la kontoro de la Ĉongĉing-a Tekstilaĵa Fabriko. Tie junulino Lin de tiu fabriko traktis pri negoco kun iu aĉetanto. Post tio ŝi diris al mi: "La centro bonvenigas fabrikojn starigi tiesian servopunkton kaj intertrakti aferon rekte kun vendantoj. La viro, kun kiu mi traktis, estas direktoro de iu podetala butiko. Li esperas aĉeti

muarajn littukojn kaj kapkusenajn tukojn de nia fabriko." De ŝi mi sciiĝis ankaŭ, ke la starigo de servopunkto far fabriko en la centro povas ne nur vendi parton de la produktaĵoj, sed ankaŭ akiri merkatajn informojn kaj koni la bezonon de la amasoj en la vivo. Tio ebligas al fabriko forigi radikale la blindecon en la produktado.

En la teretaĝo de la domo mi vidis Liŭ Tjanguj, vicdirektoron de la centro. Li, proksimume 50-jara, havas komercan sperton de pli ol 20 jaroj. Parolante pri la signifo de la foira centro en la reformo de la cirkula sistemo, li diris: "La plej grava rolo de la centro estas provizi per negoco la produktantojn kaj vendantojn, forigi necesajn interajn ĉenerojn kaj plirapidigi cirkuladon de komercaĵoj. Tio estas nova cirkula kanalo en eksperimentado."


En la urbo mi vizitis ankaŭ la Unuiĝintan Centron de Agrikulturaĵa Komercado, podetalajn vendejojn, foiron de individuaj komercistoj kaj aliajn komercajn formojn. Mi vidis, ke en la urbo ĉiuj ĉeneroj de la cirkula sistemo sin trovas en reformo, jam rompiĝis la komercaj rutinoj, kiaj unuopaj kanaloj, tro multaj ĉeneroj kaj sensanĝaj prezoj. Aperas kaj perfektigaĵoj cirkulaj formoj, pli konformaj al la karakterizaĵoj de la ĉina socialisma ekonomio en disvolvigo. Tia reformo estas, kompreneble, nur en komenca etapo. Multaj problemoj, kiaj tiuj pri la fontoj de varoj de la foira centro de industriaĵoj — nova cirkula formo kaj ĝia pozicio en la tuta cirkula sistemo, restas solvotaj en la kompleta reformo de la tutlanda cirkula sistemo.





La pogranda-venda halo de la Horloĝa kaj Okulvitra Kompanio



Muntejo de fabriko de motorcikloj kun marko Ĝjaling




Vendejo de tekstilaĵoj ĉe la industria foira centro



Edificiu de apartamente la UANG BNPU

Lucrarea de la Congrega Publica de
Societatei Statof de UANG BNPU





Jen pasagerŝipo de la unua pri-
vata ŝip-kompanio Minŝeng



Kablouramo ŝuper rivero



JANTAJ

de LI ĈJANG

Fotoj de HAJ FENG



Parto de Jantaj



Eksterlandaj turistoj bonvenigataj ĉe la haveno Jantaj



Turistoj en antikva militŝipo ĉe Penglaj

En majo de 1984, la ĉina registaro decidis malfermi 14 havenurbojn Daljan, Ĉinhŭangdaŭ, Tjanĝin, Jantaj, Ĉingdaŭ, Ljanjungang, Nantong, Ŝanhajo, Ningbo, Ŭenĝoŭ, Fuĝoŭ, Kantono, Ĝanĝang, Bejhaj kaj la insulon Hajnan al fremdaj landoj. Tio estas alia grava decido por pluapaŝe praktiki malferman politikon al fremdaj landoj post starigo de la specialaj ekonomiaj distriktoj en Ŝenĝen, Ĝuhaj kaj Ŝantoŭ de Ĝuangdong-provinco kaj Ŝjamen de Fuĝjan-provinco. En la supre menciitaj urboj oni sinsekve praktikas iujn specialajn politikojn de la speciala ekonomia distrikto por pligrandigi iliajn rajtojn. La ĉefaj politikoj estas: fremdlandaj investantoj, kiuj starigas fabrikan, povas ĝui favoron en impostado laŭ koncernaj difinoj; pligrandigi rajtojn de loka registaro en sankcio de enkonduko de fremdlanda kapitalo kaj avangardaj teknikoj por konstruoj; simpligi eniran procedon de fremdlandaj investantoj; permesi al fremdlandaj investantoj mem fondi entreprenon kaj racie longigi la tempon de kuna administrado de kune investitaj entreprenoj; permesi al investantoj, kiuj liveris avangardajn teknikojn, vendi en Ĉinio parton de la produktaĵoj, ktp. La 14 havenurboj, 4 specialaj ekonomiaj distriktoj kaj la insulo Hajnan formis marbordan fronton de la ĉina malferma politiko de sudo al nordo. Tio ne nur plirapidigas ekonomian disvolvigon de tiuj regionoj, sed ankaŭ subtenas kaj puŝas tiun de la internaj lokoj kaj pli forte akcelas socialisman modernigan konstruadon de nia lando. Ekde ĉi tiu numero ni konigas al niaj legantoj tiujn malfermitajn urbojn.

— La Red.



Dek paroj da homoj en antikvaj kostumoj ludis surnaojn pli ol 2 metrojn longajn, starante ambaŭflanke de antikva portalo. En tamburado kaj gongado homamasoj eniris en straton de antikva stilo. Ambaŭflanke de la

strato staras diversaj standoj kaj butikoj, tetrinkejoj, drinkejoj, restoracioj kaj vendejoj de lokaj manĝaĵoj. Krome tie estas ankaŭ teatroj, pupteatroj kaj cirkoj de simioludo kaj ĉina luktarto. Ankaŭ la mastroj de la vendejoj kaj

artistoj vestiĝis per diversaj antikvaj kostumoj. Ĉio tio denove aperigis antikvan straton de Ming-dinastio (1368-1644). Ĝi estas nove konstruita turisma strato sub la fama pitoreskejo Penglajge de Jantaj. Post malfermiĝo de Jantaj, ĉi tie certe plimultiĝos turistoj el aliaj landoj. Jantaj situas ĉe la bordo de la Flava Maro kaj en orienta parto de Ĝjaŭdong-duoninsulo. Ĝi konsistas el du distriktoj, unu urbo kaj dek du gubernioj kun totala areo de pli ol 18 900 kvadrataj kilometroj kaj kun loĝantoj de ĉ. 8.1 milionoj. Tie la trafiko estas tre facila. Ĝi havas 14 ankrejojn profundajn kaj neglaciigantajn, kies ŝarĝkapablo atingis 6.5 milionojn da tunoj. De tie la ŝipoj povas atingi ne nur la enlandajn havenojn, sed ankaŭ pli ol 100 havenojn fremdlandajn. Krome ĝia fervojo ligiĝas al trunkaj fervojoj de la lando kaj ĝi havas civilajn

Carma Penglaj-turo





Famaj produktoj de Jantaj: vinoj, pajloplektaĵoj, aĵuraj teksaĵoj kaj horloĝoj

aviadajn liniojn al Pekino kaj Ŝanhajo.

Jantaj havas naturdotitajn kondiĉojn. Sub la tero konserviĝas pli ol 30 mineralaj specoj, inkluzive de oro, kupro, fero, plumbo, zinko, karbo kaj grafito. Ĝia ora produktokvanto okupas ĉ. kvaronon de tiu de la lando. Jantaj estas favorata de abunda pluvo kaj modera temperaturo, estas grava bazloko de greno kaj arakido de Ŝandong-provinco. Ĝia arakida produktokvanto okupas kvaronon de tiu de la lando. Tie produktiĝas multaj fruktoj, ĝia poma produktokvanto okupas kvinonon de tiu de la lando. Ĉio ĉi tio pretiĝis bonajn kondiĉojn por disvolvi malpezan kaj manĝajan industriojn.


Post praktiko de malferma politiko al fremdaj landoj Jantaj altiris al si multe da investantoj. Nur en tri monatoj la urbo traktis kun pli ol 500 fremdlandaj komercistoj kaj sankciis 69 projektojn investitajn de fremdlanda kapitalo.

En ekonomia kunlaboro kaj teknika interŝanĝo kun aliaj landoj, Jantaj emfazas enkondukon de fremdlandaj kapitaloj kaj avangardaj teknikoj kaj plirapidigon de teknika reformo al la ekzistantaj entreprenoj.

La Jantaj-aj manĝaĵa, malpeza kaj elektronika industrioj havas certan fundamenton kun nemalmultaj famaj kaj bonkvalitaj produktaĵoj. Ekzemple, la Vin-kompanio Ĝangju kun historio

de 92 jaroj produktas ruĝan kaj blankan vinojn kaj brandon ormedale honoritan, kiuj estas vaste ŝatataj en- kaj eksterlande. Nun la kvanto de tiuj produktaĵoj ne povas kovri la bezonon de en- kaj eksterlanda merkatoj. La kompanio intencas pligrandigi la produkton per alilanda investado, enkonduki teknikojn kaj ekipaĵojn, praktiki fakan kunlaboron kaj disvolvi produktadon de altklasaj vinoj. Laŭ takso, en 1987 post finiĝo de la reformo, la jara produktokvanto de vino plimultiĝos de nuntempe 20 000 tunoj al 40 000 tunoj, inter ili altklasa vino okupos pli ol triono, la jara eksporta kvanto plimultiĝos de 200 tunoj al 5 000 tunoj.

Antaŭ 1990, oni plenumos 81 teknikajn reformajn projektojn



La Artleda Fabriko de Jantaj, konstruita per importitaj teknologioj kaj instalaĵoj


en manĝaĵa, elektronika, malpeza, meĥanika, nova konstrumateriala kaj delikata kemia industrioj. Sendube tio puŝos teknikan progreson de la Jantaj-a industrio.

La plej favora natura kondiĉo de Jantaj estas marproduktado. Ĝia marbordo longas je pli ol 1 300 kilometroj. Ĝi havas 4 grandajn fiŝejojn kun pli ol 70 specoj da fiŝoj, ekzemple salikoko, holoturio, pekteno, halioto (*Haliotis gigantea*) kaj aliaj valoraj estaĵoj. La totala produktokvanto de marproduktaĵoj okupas ĉ. dekonon de tiu de la tuta lando, inter ili la produktokvanto de salikoko okupas trionon de tiu de la lando kaj unuan lokon. Tamen nur 400 000 muoj (1 muo=1/15

hektaro) de malprofunda maro kaj malalta bordo estis utiligataj kaj pli ol 90% de ili restas virgaj. Pro tio Jantaj havas grandegajn latentajn fortojn kaj vastan perspektivon en disvolvo de marproduktaĵoj. Oni planas enkonduki avangardajn teknikojn, altiĝi teknikan nivelon en specorafinado, fekundigado, prilaborado de nutraĵo kaj fiŝkaptado; disvolvi marproduktaĵan prilaboran industrion, aktive ekspluati kaj konstrui marproduktaĵan bazlon per fremdlanda kapitalo, produkti avangardajn fiŝkaptilojn kaj fiŝŝipojn, pligrandigi kapablon de fridiga konservado, transportado kaj ŝipkonstruado. Tiam la produktokvantoj de salikoko, holoturio kaj aliaj marestaĵoj povos altiĝi plimulte kaj kon-

tentigi la bezonon en- kaj eksterlandan.

Samtempe kun tio, Jantaj intencas starigi novan ekonomian kaj teknikan regionon kun areo de 20 kvadrataj kilometroj, en la okcidenta distrikto Fulajŝan de la urbo. Tie la tero estas ebena, trafiko, provizado de akvo kaj elektra energio facilaj, pejzaĝo ĉarma. Ĝi havas strandon dek kilometrojn longan. Ĝi disvolvos ĉefe manĝaĵan, malpezan, elektronikan, aparatan, tekstilan kaj vestaĵan industriojn. Laŭ la plano oni unue konstruos 34 entreprenojn ĉine-fremdlande investatajn. Krome oni enkondukos fremdlandajn kapitalojn por konstrui aron da servoinstalaĵoj de komerco, kulturo, medicino, amuzado kaj aliaj.



La haveno Jantaj en malproksimo

Jantaj estas bona turisma loko. Dum plibonigado de la ekzistantaj turismaj instalaĵoj, oni planas finkonstrui antaŭ 1987 turisman ferian centron en la monto Dajŭang en la orienta antaŭurbo de la urbo, kie la tri flankoj frontas al montaro, kaj la lasta flanko al maro. Tie oni konstruos altan

domegon kun sinteza servo kaj amuzejoj, aron da vilaoj de diversaj stiloj, aron da kortaj loĝdomoj kun Ĝjaŭdong-a stilo kaj surmaran kaj ĉasajan restoraciojn kaj diversajn amuzejojn. Samtempe oni riparos kaj plikonstruos 12 turismajn punktojn servantajn al ili. La supre menciita "antikva

strato" estas unu el ili. Oni plivastigos la antikvan straton en "urbon de Ming-dinastio". Antaŭ 1993, la turisma regiono etendiĝos de marbordo al montara regiono, kaj tiam la turisma aktiveco de Jantaj fariĝos pli interesa kaj varia.

Horloĝoj de Jantaj kun marko Polusa Stelo ĝuas renomon en- kaj eksterlande. Jen ilia laborejo.



En vendejo de antikvecaj objektoj ĉe Penglaj-pavilono



Ĉinaj Esperantistoj-sciencistoj pri Esperanto



Goŭ Mingĝen

POST la fondiĝo de la Sciencista kaj Teknikista Esperanto-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj, iuj famaj ĉinaj sciencistoj prezentis siajn skribajn aŭ buŝajn proponojn pri la laboro de la asocio. Ili esprimis grandan entuziasmon al disvastigo kaj aplikado de Esperanto en la scienca kaj teknika kampo kaj donis nemalmultajn valorajn opiniojn.

Goŭ Mingĝen, fama ĉina paleontologo, eksestro de la Praver-tebrula kaj Prahoma Instituto, skribis en sia letero, ke li lernis Esperanton en 1938 kaj donis lecionon al kurso. Li estis ankaŭ membro de la Ĉina Esperanto-Ligo, iniciatita de la Ĉong-ĉing-aj esperantistoj en la 40-aj jaroj. Tiam li legis Esperantajn librojn, korespondis kun fremd-

landaj esperantistoj kaj povis paroli iomete en Esperanto. Nun li tre ĝojas pro la fondiĝo de la Sciencista kaj Teknikista Esperanto-Asocio. Li diris, ke li ankoraŭfoje lernos Esperanton kiel eble plej baldaŭ kaj estas preta verki disertacion en Esperanto.

La 29-an de julio ni vizitis Sun Keding, veteranan matematikiston kaj esploriston de la Instituto de Sistema Inĝenierad-arto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj. La pli-ol-sepdek-jara s-ro Sun parolis pri Esperanto vigleplene. Rememorante la pasintecon, li kvazaŭ denove vivis en la jaroj de la vigla kaj arda revolucia batalo.

S-ro Sun lernis Esperanton en karcero de la malnova Ĉinio. Tiam nur progresemaĵoj personoj

lernis Esperanton. Li diris: "Dum la jaroj de 1928 ĝis 1932 mi partoprenis revolucionan aktivadon en la Ĝjaŭtong-a Universitato de Ŝanhajo. En 1932 mi estis arestita. En la sama karcero troviĝis mezlernejo Baŭ Ĝiĝing (Jelezoz). Li kuraĝigis min lerni Esperanton, kaj mi volonte akceptis la proponon. Instruate de li, mi finlernis unu Esperantan lernolibron en nur unu monato. Poste oni translokis s-ron Baŭ en alian karceron. Ĉe la adiaŭo li diris al mi: "Ne grave. Vi jam povas memlerni." Mi laŭ lia propono komencis memlerni Esperanton. Post unu kaj duona jaroj mi liberiĝis. Kaj mi trovis profesion de instruisto en mezlernejo de Nankino. Tiam mi kaj verkisto Ŭang Jenŝu gvidis Esperanto-kurson, en kiu lernis 20-30 kursanoj.



Ŭang Deĝaŭ

En 1934 mi forlasis Nankinon kaj venis al Ŝanhajo, kie mi aliĝis al la Ŝanhaja Esperantista Asocio, kies respondeculoj estis Ĵelezo, Hu Ŝeng kaj Joĉaŝien. El la membroj de la asocio troviĝis ankaŭ kelkaj fremdlandaj esperantistoj loĝantaj tiam en Ŝanhajo. En 1937 eksplodis la Kontraŭjapana Rezistmilito, la asocio translokiĝis en la malfronton en sudokcidenta Ĉinio. La Esperanto-movado tiam viglis en Kunming, la ĉefurbo de Junnan-provinco. En 1939 mi malsaniĝis kaj ricevis kuracadon en hospitalo de la urbo Gujjang, kie mi funkciigis Esperanto-kurson kun dekelkaj lernantoj. Mi kompilis lerno-materialon por la kurso kaj instruis tie pli ol unu monaton. Tiam estis tie ankaŭ fama usona ĵurnalistino Agnes Smedley. En la milita tempo mi ne havis konstantan loĝejon nek vivon stabilan, kaj poste forlasis la Esperantan laboron pro granda okupiteco. Tamen ĝis nun mi estas ankoraŭ

korinklina al Esperanto kiel antaŭe. En la pasintaj pli ol 30 jaroj mi ricevis librojn kaj revuojn senditajn de bulgaraj kaj vjetnamaj esperantistoj. En la 60-aj jaroj Ĵelezo donacis al mi sciancan disertacion en Esperanto. Eksterlande iam eldoniĝis popularaj sciencaj revuoj, ekz., «Scienca Gazeto» de Usono, «Kolekto de SAT» kompilita de Fersman, fama akademiano de la Sovetia Akademio de Sciencoj. El tio videblis, ke jam antaŭ longe Esperanto estis uzata en la kampo de sciencoj kaj teknikoj.”


Famaj ĉinaj sciencistoj unu-anime aprobis, ke Esperanto estas disvastigata kaj uzata en la kampo de sciencoj kaj teknikoj por fari internacian komunikadon.

Fama akustikisto Ŭang Deĝaŭ, ekstro de la Akustika Instituto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj, glaĉerologo Ŝi Janfeng kaj aliaj opinias necesa lernigi kaj


disvastigi Esperanton en la kampo de sciencoj kaj teknikoj. S-ro Ŭang diris, ke ekzistis Esperanta scienc-teknika revuo en Ĉinio, kaj nun ni ankaŭ devas havi tian revuon, kio utilos al pli intima kaj pli vasta akademia interŝanĝo en la internaciaj scienc-teknikaj rondoj.

Geologo Liŭ Dongŝeng, sekretario de la Ĉina Scienc-teknika Asocio, lernis Esperanton per korespondado en 1935 en Ŝanhajo. En kunsido li diris, ke Esperanto estas facile lernebla. Tiu, kiu bone posedas unu el la hindeŭropaj lingvoj, povas rapide ellerni nian lingvon. Esperanto povas fari akademian interŝanĝon pli facila. Paleontologo Ĝoŭ Mingĝen diris ankaŭ, ke sciencistoj, kiuj bone posedas unu el la hindeŭropaj lingvoj, povas ellerni Esperanto-abocon en la unua monato kaj perfektigi sin jam en la sekvanta. Ili proponis tuj funkciigi Esperanto-kurson, lerni kaj apliki nian lingvon.

Liŭ Dongŝeng




Sun Keding



Matematikisto Sun Keding opinias, ke Esperanto estas la plej scienca, plej belsona kaj plej utila internacia helpa lingvo. Ĝuste pro sia artefariteco Esperanto evitis mankojn de naturaj, naciaj lingvoj. Ĉiuj ĝiaj ŝatantoj povas facile ellerni ĝin. Ĉiuj esperantistoj estas tre intimaj en intervidiĝo. La diferencoj inter la orientaj kaj okcidentaj lingvoj estas tre grandaj kaj la pensmanieroj inter la orientanoj kaj okcidentanoj estas ne tute samaj. Estas malfacile por la orientanoj lerni eŭropajn lingvojn. Sed, ellerninte Esperanton, oni povas pli facile lerni eŭropan lingvon. Li diris, ke la socialisma Ĉinio devas fari kontribuon en propagando de Esperanto, por ke la vastaj popolamasoj konu Esperanton kaj miloj kaj dekmiloj da homoj sin ĵetu en la Esperantomovadon.

Entomologo Io Chou en sia letero diris, ke Esperanto estas necesa por taksonomio, tio signifas, ke oni bezonas enkonduki Esperanton en la scienc-teknikan interŝanĝon. Li diris, ke ĉiu vivaĵo en taksonomio havas sian latinan nomon. Tio estas bona kaj apro-



Ŝi Jafeng

bita de la tuta mondo. La "Internacia Kodo pri Nomumado de Vegetaĵoj" difinas, ke ĉiuj disertacioj devas esti publikigitaj latine, ankaŭ tio estas ĝusta. Sed ne estas facile por la orientanoj lerni la jam arkaikajn eŭroplingvajn literojn. La "Internacia Kodo pri Nomumado de Animaloj" difinas, ke ĉiuj disertacioj povas esti publikigitaj en la lingvoj angla, franca, germana, itala aŭ latina, almenaŭ ilia skizo devas esti verkita en unu el tiuj kvin lingvoj. Tio multe helpas al

eŭropaj sciencistoj, sed kaŭzas pezan ŝarĝon al legantoj, precipe al tiuj en la Oriento, ĉar por legi la disertaciojn ili devas ellerni tiujn kvin lingvojn. La orientaj zoologoj, antaŭ ol komenci sian esploradon, devas dediĉi duonon de sia vivo al lernado de fremdaj lingvoj. Aplikado de Esperanto en zoologio, precipe en taksonomio, certe liberigos la zoologojn! La vasta aplikado de Esperanto en la scienc-teknika interŝanĝo certe liberigos ĉiujn sciencistojn el sub la peza ŝarĝo.

NOVA GAZETO EN ESPERANTUJO

NOVA VOĈO

**VOĈO DE
HANDIKAPULOJ**

Aperas 6-foje en la jaro. Ofsete presata. Grafike moderna aranĝo. Enhave riĉa!

**Redaktas:
DUŜAN ADNADJ**

Jen aŭdu nian VOĈON! VOĈO ne lamentas, ĝi: malkovras novan mondon al vi — mondon de handikapuloj, polemikas, proponas, konsilas, helpas, movadumas, recenzas, alproksimiĝas kaj amikiĝas!

Nia VOĈO estas VOĈO por ĉiuj — tio estas ankaŭ via VOĈO Jarabono ne ŝanĝita: 5 US\$, 12.- DM aŭ egalvaloro. Abonu ĉe niaj perantoj aŭ rekte per poŝtenpagilo al adreso: "VOĈO" 56227-Borovo, Ŝkolska ul. 25, Jugoslavio.

Al sama adreso estas bonvenaj viaj kontribuajoj, informoj kaj helpo!

La Esperanto-Ligo por Norda Ameriko Alrigardas la Estontecon

DE GREGORY V. WASSON

LA Esperanto-Ligo por Norda Ameriko (ELNA) fondiĝis en 1952. Malgraŭ sia nomo, ĝi ne estas kontinenta organizo, sed la oficiala Esperanta asocio por Usono. Proksimume 600 homoj jam membriĝis al ELNA por la

jaro 1984 — bedaŭrinda statistiko por unu el la plej potencaj landoj de la mondo, sed statistiko kiu substrekas la fakton almenaŭ rilate Esperanton ke oni povas konsideri Usonon nacio de la Tria Mondo! La kialoj por ĉi tio estas

diversaj, sed plej gravas la fakto, ke Usono estas vasta lando kun nur unu oficiala lingvo. Usonanoj ne intime sentas la bezonon por internacia lingvo kaj fakte ne interesiĝas pri aliaj lingvoj ĝenerale. Eble persona rakonto pli bone klarigos ĉi tiun sintenon rilate fremdlingvojn. Kiam mi estis 6-7-jara, mi renkontis, por la unua fojo, la patron de mia patrino, grizharan maljunulon, kiu scipovis nur la germanan. Kiam li, post tiom da jaroj, finfine ekvidis sian karan nepon, li tuj alparolis min germane. Kaj pro timo mi (kiu tiutempe tute ne scias, ke ekzistas aliaj lingvoj krom la angla) subite kaj laŭte ekploris, rifuzante ĉiun kareson de la ava mano. La sinteno de usonanoj al fremdlingvoj ne fundamente malsimilas al la reago de tiu 7-jara bubaĉo. Ĝi estas miksaĵo de timo kaj aroganteco.


La diversajn agadojn de ELNA oni prizorgas en la Centra Oficejo, kiu situas en la Sanfranciska regiono de norda Kalifornio. La CO estas tri-ĉambra oficejo en la tria etaĝo de moderna konstruaĵo, kiun ELNA dividas kun la oficejoj de William Sonoma, bone konata usona entrepreno kiu vendas kuirartajn ilojn altkvalitajn. En la CO troviĝas la Libroservo de ELNA kaj la arkivo. La Libroservo de ELNA estas la plej

S-ino Schulze (la dua de dekstre), gvidanto de la Esperanto-kursaro en San-Franciska Stata Universitato



granda en Norda Ameriko kaj unu el la plej gravaj en la tuta mondo. Ĝia stoko inkluzivas pli ol mil titolojn. En la arkivo oni konservas Esperantaĵojn, gazetojn, artikolojn, librojn kaj diversajn aliajn objektojn kiuj iel rilatas al la Esperanto-Movado en Usono. La CO estas nun ekipita per komputilo, kiun oni pli kaj pli uzas por pritrakti librotendon, fakturojn, informpetojn kaj abono/membro-listojn. Kutime nur unu homo, la direktoro, deĵoras en la CO — mirinda fakto, se oni konsideras, ke proksimume 3 000 informpetoj kaj 1 000-2 000 mendoj atingas la Centran Oficejon ĉiujare. De tempo al tempo, volontuloj ankaŭ laboras — Ĉinio fakte kontribuis jam ĉirilate: Chien Mingchi, instruistino de la angla lingvo kaj Esperanto en Ŝanhajo, sindone kaj ofte laboris en la CO de ELNA dum 1982-83, kiam ŝi studis en Usono ĉe la Ŝtata Universitato de San Francisko, instituto kiu ĉiujare ofertas intensivajn Esperanto-kursojn dumsomere. La ĉina esperantistaro ankaŭ alimaniere plifortigas la Usonan Esperanto-Movadon per sia tre aktiva agado en la propra lando. Artikolo, kiu aperis en la grava ĵurnalo "Los Angeles Times" komence de 1984, pri la sukcesoj de Esperanto en Ĉinio rezultigis multajn informpetojn kaj novajn membrojn de ELNA. Tiu artikolo estis poste represita en aliaj usonaj ĵurnaloj.

Pere de la CO de ELNA usonaj esperantistoj povas aboni diversajn gazetojn, inkluzive "El Popola Ĉinio" (kiun abonas 100-200 usonanoj ĉiujare), membriĝi al ELNA kaj UEA, mendi librojn, pagi UK-kotizojn kaj peti informon pri lokaj kluboj kaj diversaj aliaj aferoj. Aldone, oni povas aranĝi vojaĝojn pere de la ELNA-Vojaĝoservo, kiun prizorgas Lusi



Festado de la 15-a jaro de la Esperanto-kursaro, San-Franciska Ŝtata Universitato

Harmon, usona esperantistino kaj profesia vojaĝaganto jam sufiĉe bone konata de ĉinaj aktivuloj.

La plej grava kontribuo de ELNA al la jubilea celeburo de Esperanto en 1987 estas, sendube, la aperigo de la 30-minuta filmo pri Esperanto, en kiu rolas Steve Allen, aktoro kaj verkisto (inkluzive de vojaĝlibro pri Ĉinio), vaste konata kaj ŝatata tra Usono. La filmo baldaŭ aperos poregione en Usono sur la Publika Televida Sistemo. Altnivela kaj profesie produktita, la filmo celas rompi la kutiman usonan nescion pri Esperanto kaj, pli ĝenerale, pri la internacia lingvo-problemo. La filmo, kiu nomiĝas "The World of Esperanto" ("La Mondo de Esperanto"), verŝajne necesigos la starigon de kursoj. ELNA jam interkonsentis dum la UK en Vankuvero, Kanado, kun la brita entrepreno. Group Five pri la uzo de la kaseto kurso "Jen Nia Mondo" kiel baza elemento de nova propaganda programo, kiu celas, kune kun la filmo, vekti la publikon usonan al la utilo de kaj bezono por neŭ-

trala helplingvo en la sfero de internacia interkompreno.

La Esperanto-Ligo por Norda Ameriko alrigardas la estontecon. Efike utiligante la plej modernajn ilojn kaj rimedojn de komunikado kaj negoco, ELNA celas, ĉiam pli aŭdace kaj frappe, la usonan publikon, kiu estontece, espereble, pli ofte kaj fundamente partoprenos la Esperantajn movadon kaj kulturon, al kiuj mankas, tro ofte, ne-eŭropaj samideanoj kaj ideoj.



ANONCO

La redakcio de "El Popola Ĉinio" bezonas Esperantajn poŝtmarkojn. Kiuj bonvolas cedi al ĝi siajn posedaĵojn, bonvolu skribi al ĝi pri dezirata rekompenco.

ĈINAJ PROVERBOJ

1. Milfuta arbo alte staras, folioj ĝiaj teren falas.
2. Netaksebla homo laŭ la ekstero, nemezurebla marakvo per sitelo.
3. Por bela floro peonia necesas garno verdfolia.
4. Juna aĝo sen peno — maljuneco en ĉagreno.
5. Detruigās granda digo nur pro truo de formiko.
6. Mil-lia* vojaĝo ekas per unu paŝo.

* Lio — ĉina mezurunuo de longo egala al duonkilometro

KELKAJ HUMURAJOJ EL NEDERLANDO

1. Patrineto laŭtleĝas artikoleon el la gazeto por 12-

jara filo, kiu ĵus fariĝis membro de sportklubo. "Aŭdu, Dongĉjo! Iu ŝanhajano kuris dek kilometrojn kaj post tio saltis trans larĝan fosajon!" "Ho, ne malfacile post tia ekkuro!"



2. Iu virino estas malsana dum kelkaj semajnoj. De tempo al tempo najbarino venas por helpi ŝin iom. Ŝi ĉiufoje ricevas freŝajn ovojn kiel dankon. Foje la ovoj estas sufiĉe malgrandaj, kaj tial la najbarino diras: "Nu, ĉi tiuj ovoj estas ja tre malgrandaj!" La malsanulino respondas: "Bonvolu pripensi, ke ne estas mi mem, kiu demetas la ovojn!"

3. "Ĉu vi estas certa, ke tiu kakto floras po unu fojo en ĉiu jarcento?" demandis aĉetanto al floristo. "Tute certe! Se ne estas tiel, vi rajtas reveni por redoni ĝin."


"ĈU MULTE PAROLI ESTAS UTILE?"

Ziĉin demandis Mozi: "Ĉu multe paroli estas utile?"

Mozi respondis: "La bufoj, ranoj kaj muŝoj senĉese kvakas kaj zumas tage kaj nokte, eĉ ĝis raŭkiĝo, kion ja neniu atentis. Sed la kokeriko ĉe la tagiĝo tuj vekas la mondon el dormo. Kian utilon estigas multa parolado? Grave estas paroli ĝustatempe kaj trafe."



KARIKATURO



**JAPANA-ĈINA AMIKA
VIZIT-GRUPO EN ĜJAMUSI**

La 29-an de aŭgusto, 1984, la sesmembra Japana-Ĉina Amika Vizitgrupo al Hejlongĝjang-provinco por Rememori Verdano Majon kaj Balai Ŝian Tombon, vizitis la urbon Ĝjamusi en la provinco Hejlongĝjang. La grupon gvidis s-ro Mano Koiĉi, la konstanta konsilanto de la Tokia Japana-Ĉina Amika Asocio kaj prezidanto de la direkto de la Japana-Ĉina Studio. En tiu grupo estis ankaŭ Ozaŭa Juki, fratino de Verda Majo.

La grupo veturis al Sifeng-monto por kulti kaj balai la tombon de Verda Majo, kaj poste faris intiman intervidiĝon kun la Pekinopera Trupo de Ĝjamusi, kiu prezentis la teatraĵon "Verda Majo", kaj laborantoj de la Oficejo de la Historiaj Restaĵoj. Ozaŭa Juki donis la de ŝi multjare zorge konservitajn leterojn, kiujn Verda Majo skribis al siaj familianoj,

Sjaŭ Hujĝjŭan en Esperanta leciono



kiam ŝi lernis en mezlernejo kaj vivis en Ŝanhajo, al la Oficejo de la Historiaj Restaĵoj por ke la lasta faru elektronikan fotokopion de ili por sia konservo.

**LA UNUA ESPERANTO-
KURSO EN UNIVERSITATO**

La fremdlingva fakultato de la Junnan-a Universitato kaj la Junnan-a Esperanto-Asocio funkciigis kune dujaran Esperanto-kurson en aŭtuno, 1984. La kurson instruas en- kaj eksterlandaj eminentaj esperantistoj. La studentoj devas lerni dekelkajn kursojn de Esperanto, ĉina lingvo, historio, geografio, filozofio, politika ekonomiko kaj aliaj.

**LA KVARA PORINSTRUISTA
ESPERANTO-KURSO**

Komisiite de la Ĉina Esperanto-Ligo, la Ŝanhaja Fremdlingva Instituto okazigis la kvaran porinstruistan Esperanto-kurson en septembro 1984. La funkciigo de la kurso estis konsentita de la Eduka Ministerio de la Ĉina Popola Respubliko kaj enlistigita en la porinstruistan reedukacion planon donitan de la Eduka Ministerio al la instituto.

La estraro de la Esperanto-klubo "Malmo". La unua (de dekstre) estas ĝia prezidanto s-ro Sten Svenonius.

**JUNA ESPERANTISTINO
DE UHAN**

Sjaŭ Hujĝjŭan, dekunu-jara knabino, junpioniro de kvina klaso de la Jijŭanlu-a Elementa Lernejo en Uhan, aliĝis al abocokurso de Esperanto funkciigata de la Uhan-a Esperanto-eduka Centro. Plejparto de la kursanoj estis plenkreskuloj. Post pli ol unu monato ŝi finis sian lernadon en tiu kurso kaj sukcese trapasis la buŝan ekzamenon per sia klara prononcado kaj flua respondo.

**E-MOVADO
PROSPERAS EN NAMUR**

En Namur, mezgranda urbo en Belgio, E-movado ne ŝajnis speciale brila en la komenco, kaj estis malmultaj disĉiploj kaj rimedoj. Nur dank' al persistema varbado de klubo Karl Berhino aperis mirinda prospero kaj la lingvo disvastiĝis vere grandskale. Esperanto-kursoj multobligis, oni instruas E-on en tri lernejoj kaj en tri vesperkursoj, kaj en 1985 E-kursoj funkcios en kvar lernejoj. Tie mankas ne lernantoj sed instruistoj! De 1984 la klubo havas librovendejon poresperantan, kaj jam dufoje okazis en universitato kongreso pri kibernetiko, en kiu partoprenis ankaŭ ĉina profesoro

el Pekino. Ankaŭ korespondokursoj ekzistas kaj dank al ili aperas novaj aktivuloj por E-movado.

LA PLEJ GRANDA E-KLUBO EN SVEDIO

En Malmo, la tria urbo de Svedio, troviĝas la plej granda kaj malnova E-klubo de la lando "Klubo Esperantista de Malmo". La klubo estas fondita la 12-an de aprilo, 1906. Nun ĝi havas 150 membrojn kaj grandan klubejon en kiu estas kongresejo, E-kursejo, kuirejo, biblioteko kaj arkivejo. En la biblioteko estas konservitaj 3 200 E-libroj; en la arkivejo troviĝas ĉiuj gazet-eltranĉaĵoj pri Esperanto el ĉiuj svedaj gazetoj inter la jaroj 1897 kaj 1983. La klubo gazeto "La Folio" eldoniĝas jam de multaj jaroj. En 1948 la klubo invitis al Malmo la 33-an Universalan Kongreson de Esperanto.

Malmo ricevis sian Esperantostратon okaze de sia 75-jara jubileo kaj la klubo ricevis la honorplateton de la urbo Malmo. Preskaŭ ĉiu-jare la klubo okazigas por la vasta publiko E-ekspozicion en la okazo de Skania Foiro.

SANITARA BULTENO SANO

Jam de ok jaroj regule kvaronjare aperas sanitara bulteno SANO,


kiu alportas novaĵojn el la medicina mondo en formo de medicinaj sciigoj, referaĵoj, tradukoj. Inter ĝiaj abonantoj kaj aŭtoroj de kontribuajoj troviĝas medicinistoj, farmaciistoj, biokemiistoj, veterinaroj, dentkuracistoj, ruĝkrucanoj. Por aliaj scivolemaj homoj estas popular-sciencaj artikoloj.

UNUA KONGRESETO DE KASTORA KLUBO

Kastora klubo de Esperanto, internacia klubo por infanoj kaj gejunuloj, havas sian sidejon en Pollando, kaj nun ĉ. 6 000 infanoj kaj gejunuloj el 56 landoj fariĝis ĝiaj membroj. La ĉefa celo de la klubo estas ebligi al la membroj interpersonajn amikajn kontaktojn. Esperanto estas la oficiala lingvo de la klubo.

En 1984 la klubo festis la 20-an datrevenon de sia fondiĝo kaj de la 15-a ĝis la 22-a de julio okazis en Bydgoszcz de Pollando la unua kongreseto, en kiu partoprenis 106 personoj el Hungario, Ĉeĥoslovakio kaj Pollando. La kongresanoj sendis al samaĝuloj en la mondo la alvokon: Lenu Esperanton, aliĝu al la amika rondo kaj partoprenu en la venontaj kongresetoj.

*La partoprenantoj de la Unua
Kongreseto de Kastora Klubo*




SUR NIA LIBROBRETO

Du bukedoj el la manoj de Tibor Sekelj


En tiu ĉi rubriko ni aperigas recenzojn pri Esp-ajoj, kiujn la eldonistoj sendis al ni po-du-ekzemplere, kaj nur mencias tiujn ricevitaĵojn po-unu-ekzemplere. Ni ankaŭ bonvenigas recenzojn faritajn de alilandaj seriozaj samideanoj kaj ilin rekompencas pro la kontribuajoj per niaj Esp-aj eldonaĵoj aŭ ĉinaj metiartaĵoj. La redakcio ne prenas sur sin la respondecon pri la laŭdoj aŭ kritikoj de la recenzantoj.

LA RED.

EN miajn manojn venis du bukedoj el la manoj de Tibor Sekelj, nome **ELPAFU LA SAGON** kaj **LA MONDO DE TIBOR SEKELJ**. La unua estas kolekto de buŝaj poemoj esperantigitaj de Tibor Sekelj, eldonita de UEA kiel n-ro 18 en la Serio Oriento-Okcidento. Ĝia formato: 14.5 × 21 cm. 187 p. (Prezo: 27 gld. por broŝuro, 36 gld. por tola binditaĵo, plus sendkostoj.) La dua estas serio de kvin kolektoj de lignogravuraĵoj faritaj de Andrusko Karoly laŭ fotoj faritaj de Tibor Sekelj pri la kvin kontinentoj. Ilia formato: 4 × 5 cm. Tiu serio redaktita de Tibor Sekelj estas eldonita de



“Elpafu la Sagon”



“La Mondo de Tibor Sekelj”

la Esperanto-Societo (adr.: Trg. cara J. Nenada, 24000 SUBOTICA, Jugoslavio).

Dum siaj esploraj vojaĝoj tra la mondo, la fama etnografo s-ro Tibor Sekelj konatiĝis kun buŝaj poezioj de diversaj etnaj kolektivoj. Por riĉigi la Esperantan literaturon, li elektis 187 el la kolektitaj poemoj kaj ilin tradukis el 24 lingvoj en la internacian lingvon. Dank' al lia helpo nun ni povas legi jenan kanton de perua popolano pri sia “Soleco”:

*Sola en mia kabano
mi ploras la tutan nokton.
Mi diras al miaj okuloj:
ĉesu plori,
ne verŝu larmojn plu.
Sed ili ploras kaj ploras
en la mallumo senĵina.*

Sub la titolo “Birdo kaj Nomadado” tataroj versas pri sia nomada vivo:

*Ho, birdoj kiuj superflugas
niajn dezertojn,
vi estas niaj fratoj.*

*Nomadoj senhejmaj vi estas
same kiel ni.*

*Kiu scias kiom da riveroj vi
transflugis,*

*kiu scias kiom da montoj
kaj dezertoj vi vidis,*

*kiu scias en kiom da lokoj
vi neston faris,*

*samkiel ni, kiuj vagas tra
senvojejoj.*

Kaj hinda popolano elverŝas sian sopiron per la poemo “Revenu”:

*Ni neniam al vi riproĉis, ne-
niam ni al vi malbonon
faris,
revenu al ni!*

*Ni ĉiam vin amis, ĉiam dor-
lotis,*

*vivante kun vi sub la sama
tegmento;
ne forlasu nin nun!*

*Alproksimiĝas la pluvaj
noktoj, ventoplenaj tagoj,
ne foriru nun!*

*Ne lasu nin apud estingita
ĝiko
revenu al ni!*

*Vi ne povos vin protekti de
la pluvo sub arbo,*

*saliko vin ne protektos de
malvarma furioza vento.*

Revenu al via hejmo!

Ĝi estas freŝe balaita por vi.

En ĝi ni ankoraŭ vin amas.

*La rizo pretigita por vi,
akvo alportita.*

*Revenu hejmen, revenu hej-
men!*

Versoj simplaj senrimaj, voĉoj venintaj el fundo de la koro, vere kortuŝaj. Legante la versaĵojn mi spertis jen dolĉan senton de amo, jen naivan ĝojon de sonĝanto, jen doloran triston de malfeliĉulo, jen fieron de grandanima ĉasisto. . . Kvankam ankaŭ mi preferas versojn kun rimoj, tamen la liberaj versoj en la libro same min ĉarmas. Mi kredas, ke ĝi sukcesos konkeri la koron de multaj legantoj.

La lingvo de la versoj fluas kiel facila prozo malgraŭ kelkaj plumeraroj kiel **teruriga**, **raviga**, **konfuzigas** kaj **ĉarmigas** kun superfluaĵ -ig-, kiuj ne malhelpas la ĝuadon de la poezio. Estas tamen rimarkinde, ke s-ro Tibor Sekelj enkondukis preskaŭ 50 neologismojn el afrikaj, aziaj, sudamerikaj kaj oceaniaj lingvoj por “akceli la veran internacieron de la lingvo”. Mi opinias, ke la vorto **maozio** ĉin-devena kaj signifanta “larĝan konusforman ĉapelon el pajlo, palmfolioj aŭ bambuo” laŭ la noto de la enkondukinto, estas nenecesa. Ĉu la formoj pajlĉapelo aŭ bambuĉapelo kaj palmfolia ĉapelo ne taŭgus por esprimi la nociojn? **Maozi** (maŭzi) en la ĉina lingvo signifas kapveston kaj ĝi ne povas preni al si la signifon de aliaj vortoj **caomao** (t. e. pajlĉapelo) kaj **douli** (t. e. bambuĉapelo). Pli dubindaj estas la aliaj du ĉin-devenaj vortoj **ĝanpino** kaj **svejalti**, kiuj estas tute

nerekoneblaj por mi; sve kaj ĵal estas silaboj fremdaj al la hana lingvo. Mi ne oponas sendistinge ĉiujn neologismojn, tamen mi timas, ke senskrupula ŝveligo de la vortaro Esperanta malfaciligos nian lingvon. Por pliinternaciigi la vortaron de Esperanto oni devus rigore observi la 15-an regulon de la Plena Gramatiko de Esperanto starigita de la majstro.

La kvin kuriozaj liliputaj libretoj kun 220 artisme gravuritaj bildoj pri homoj, domoj kaj naturaj belaĵoj tiklas la koron de la kolektemuloj. La bildoj prezentas al ni fragmentojn de la esploro-vojaĝoj de nia etnografo tra la mondo. Por havigi al la legantoj gvidajn ideojn en aprecado de la bildoj, la redaktoro donis enkondukon el ĉ. 200 vortoj al ĉiu el ili. Estas notinde, ke 97 el la gravuraĵoj temas pri homoj, kies nomojn oni ne menciis. Por la legantoj eble tute ne gravas la personaj nomoj. Tamen, se oni donus necesajn klarigojn al la bildoj, oni povus pli facile distingi la maoriojn de la eskimoj, ĉu ne?

Recenzis LAŬLUM

NOVE RICEVITAJ LIBROJ

LA VIVO DE D-RO L. L. ZAMENHOF EN BILDOJ kompilita kaj eldonita de Henk Thien. Formato 21 × 29.5 cm. 128 p. Prezo 30 gld. plus sendkostoj. Mendebila ĉe la libroservo de UEA.

KIUJ SEMAS PLORANTE. . . originala romano de Eva Tófalvi k Oldrich Knichal, gajninta la unuafojan premion Raymond Schwartz, eldonita de UEA. formato: 15 × 21 cm. 107 p. Prezo 15.00 gld. plus 10% por sendkostoj.

ESPERANTO POR PRAKTIKADO lernolibro eldonita de

Union Francaise pour l'Esperanto. Formato 21 × 30 cm. 30 p. Prezo ne montrita.

PIONIROJ KAJ VETERANOJ DE M. E. M. de Nikola Aleksiev, eldonita de la Bulgara Esperantista Asocio. Formato: 14.5 × 20 cm. 68 p. Prezo ne montrita.

ĈU VI KONAS LA TERON? ĉapitroj el la geologiaj sciencoj originale verkita de d-ro Endre Durich, eldonita de UEA. Formato: 23 × 16.5 cm. 150 p. plus 68 p. da scienc-teknikaj anoncoj. Prezo: 12 gld. plus sendkostoj.

LA KVARTETO DE MENDELSSOHN KAJ ALIAJ RAKONTOJ de Jaroslaw Iwaszkiewicz, esperantigita de Jerzy Grum, eldonita de la Pola Esperanto-Asocio. Formato: 14.5 × 20.5 cm. 104 p. Prezo ne montrita.

LA VIVO DE SÁNDOR KÖRÖSI CSOMA de Ferenc Szilágyi, eldonita de la Hungara Esperanto-Asocio. Formato: 14 × 20 cm. 151 p. Prezo 10 gld.

FEBRO originala romano de Istvan Nemere, eldonita de la Hungara Esperanto-Asocio. Formato: 14.5 × 20.5 cm. 132 p. Prezo: 15 gld.

LA ORA POZIDONO de Julian Modest, eldonita de la Hungara Esperanto-Asocio. Formato: 14.5 × 20 cm. 68 p. Prezo: 6.1 gld.

LA TUTA ESPERANTO de Henrik Seppik, tria eldono ofseta de la Hungara Esperanto-Asocio. Formato: 14 × 20 cm. 184 p. Prezo: 15 gld.

LA TROMBONOJ DE JERIKO en la germana kaj Esperanto verkita de Rikardo Ŝulco, eldonita de la Esperanto-Centro Paderborn. Formato: 14.7 × 20 cm. 68 p. Prezo ne montrita.

RIBELA KORDO poemaro de Ĥristo Gorov, eldonita de la Hungara Esperanto-Asocio. Formato: 13.5 × 20 cm. 71 p. Prezo: 8.1 gld.

DILEMOJ DE LA NUNTEMPO — VIDE EL HUNGARIO redaktita de Sándor Révész, eldonita de la Hungara Esperanto-Asocio. Formato: 14.5 × 20.5 cm. 102 p. Prezo: 12 gld.

JOHANO LA BRAVA epopeo de Sándor Petöfi, esperantigita de K. Kalocsay, kvara eldono, la Hungara Esperanto-Asocio. Formato: 14.5 × 20.5 cm. 60 p. Prezo: 12 gld.

EŬLALIA originala romano de Lorjak, eldonita de la Hungara Esperanto-Asocio. Formato: 14 × 20 cm. 192 p. Prezo: 21 gld.

ETAJ RAKONTOJ de Eduardo Novembro, eldonita de la Portugala Esperanto-Asocio. Formato: 12 × 17 cm. 129 p. Prezo ne montrita.

HISTORIO DE IFEF 1909-1984 kompilita kaj eldonita de la Historio-Komisiono de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio. Formato: 15 × 21 cm. 80 p. Prezo ne montrita.

AMUZA LEGOLIBRO EN ESPERANTO redaktita de Albert Lienhardt, eldonita de la Hungara Esperanto-Asocio. Formato: 14 × 19.7 cm. 216 p. Prezo: 16.5 gld.

HUNGARAJ FABELOJ de Elek Benedek, esperantigita de Maria Benczik, eldonita de la Hungara Esperanto-Asocio. Formato: 14 × 20 cm. 71 p. Prezo: 10 gld.



Antikva urbo Pekino

de ŬANG ĜINPO

En tiu ĉi rubriko ni konigos unu post alia la vojaĝajn liniojn aranĝitajn de la Ĉina Internacia Turisma Servo por la postkongresaj ekskursoj de la 71-a Universala Kongreso de Esperanto. Unu el ili estas Pekino — Ŝĵian — Lŭojang — Ĝengĝoŭ — Kantono. Laŭ tiu ĉi linio vi vidos la monde faman Grandan Muron, la majestan kaj imponan Imperiestran Palacon, la grandiozan armean formacion el argilaj soldatoj kaj ĉevaloj antaŭ dumil jaroj, ŝtonkavernaron konsistantan el 970 000 budhaj statuoj, la Flavan Riveron — lulilon de la ĉina nacio kaj ĉarmegajn pejzaĝojn de suda Ĉinio. Bonvenon al vi, karaj geamikoj, venu kaj faru agrablan vojaĝon en Ĉinio laŭ via elektita linio.

— La Red.

Pekino, la ĉefurbo de la nova Ĉinio, estas historia kultura urbo de Ĉinio kaj antikva urbo fame konata tra la mondo. Ĉiutage ĝi altiras al si milojn kaj dekmilojn da turistoj venintaj el diversaj landoj de la mondo.

Pekino havas longan historion. Antaŭ 500 000 jaroj "pekinhomoj" postlasis vizitindajn ruinojn en la loko Ĝoŭkoŭdjan, 50 kilometrojn sudokcidente de Pekino. Kiel urbo, Pekino originis de Ŝang-dinastio antaŭ pli ol trimil jaroj kaj ĝia plej frua nomo Ĝji aperis en la kroniko. Post la 6-a jarcento a. K. ĝi fariĝis ĉefurbo de la regno Jan, unu el la sep potencoj en la periodo de Militantaj Regnoj. Meze de la 12-a jarcento Ĝin-dinastio oficiale prenis ĝin kiel sian ĉefurbon. Poste, ĝi

estis ĉefurbo de la sinsekvaj dinastioj Jŭan, Ming kaj Ĉing. En la jaro 1403, imperiestro Jongle de Ming-dinastio nomis ĝin Pekino.

Dank' al la konstruado en pluraj dinastioj, antikvaj budhismaj temploj, kioskoj kaj pavilonoj, imperiestraj ĝardenoj kaj palacoj dislokiĝas kiel inkrustitaj gemoj en kaj ekster la urbo Pekino.


La Imperiestra Palaco en la centro de Pekino, alinome la Malpermesita Urbo, estis la palaco de la imperiestroj de Ming- kaj Ĉing-dinastioj. Nun ĝi estas la plej granda palaca konstruaĵaro bone konservata en Ĉinio. La konstruado komenciĝis en 1406 kaj finiĝis en 1420. La palaco okupas areon de 720 000 kvadra-

taj metroj kaj estas ĉirkaŭata de muroj 10 metrojn altaj kaj larĝa kanalo. Tie viciĝas unuj post aliaj imponaj kaj grandiozaj konstruaĵoj. La ĉefaj konstruaĵoj estas la tri grandaj haloj, kiuj servis kiel solenejoj de la imperiestroj por gravaj ceremonioj, akceptado de ministroj kaj altranguloj kaj pri-traktado de ŝtataj aferoj. Krome estas multnombraj kortoj kaj ĝardenoj por loĝado kaj distrado de la imperiestraj edzinoj kaj krom-edzinoj. Interalie la plej impona estas la Halo Tajhe sur la centra aksa linio de la palaco. Ĝi estis konstruita sur 8-metre alta bazo kun trietaĝaj blankmarmoraj ŝtuparoj kaj vidiĝas de malproksime kvazaŭ dia domo en mito. En Ming- kaj Ĉing-dinastioj ĝi estis loko de solenaj ceremonioj. Nun la dekoracio en la ĉefaj haloj kaj ĉambroj de la palaco estas originalaj objektoj.

En Pekino troviĝas ankaŭ aliaj vidindaĵoj, la antikva imperiestra ĝardeno Bejhaj-parko, Ĝingŝan-parko, sur kies montetpinto oni povas havi panoraman vidon de la nova fizionomio de la tuta urbo, la Ĉiela Altaro majstre konstruita, kiu servis siatempe al la imperiestroj por kulturi la Ĉielon kaj preĝi por riĉa rikolto, la antikva Observatorio, unu el la

En la Somera Palaco

Foto de SOŬ LJANG





La nove rekonstruita kultura strato

Foto de HAJ FENG

monde famaj astronomiaj antikvaĵoj, k.t.p.

La Somera Palaco nordokcidente de la urbo antaŭe estis someruma loko de la imperiestraj familioj de Ĉing-dinastio. Ĝi konsistas el Ŭanŝou-monteto kaj Kunming-lago kaj kovras areon de 290 hektaroj, kies tri kvaronoj estas akvosurfaco. Tie la pejzaĝo ĉarmas tra la tuta jaro. Inter la verda monteto kaj lazura lago vidiĝas elegantaj konstruaĵoj kun diversaj stiloj kaj formoj. La palaco estas konata kiel ĝardeno de klasika stilo, ŝatata de turistoj en kaj ekster Ĉinio.

Se vi veturos nordokcidenten de Pekino, vi povos viziti la Dek Tri Maŭzoleojn de Ming-dinastio kun abundaj historiaj kulturaj objektoj kaj Badaling — la gravan pasejon de la Granda Muro. La Granda Muro famiĝis tra la mondo jam antaŭ longe, kaj ties sektoro ĉe Badaling estas plej bone konservata. Estas diro en Ĉinio: “Kiu ne atingis la Grandan Muron, tiu ne estas heroo.” Ĉiuj turistoj venintaj al Pekino vizitis la Grandan Muron kaj kun granda intereso surgrimpis la

alarman turon, por apreci de malproksime la Grandan Muron, kvazaŭ giganta drako inter la montoj.

Konforme al la ĉiama plimultiĝo de alilandaj turistoj, en la lastaj jaroj Pekino plirapidigis konstruadon de turismaj hoteloj. En 1978 Pekino havis nur 9 hotelojn kun pli ol 7 700 litoj, sed nun 44 hotelojn kun pli ol 23 000 litoj. Inter la nove konstruitaj hoteloj troveblas ne nur internacie unuaklasaj, sed ankaŭ mezklasaj taŭgaj por ordinaraj turistoj. Ambaŭ kun kompletaj instalaĵoj estas komfortaj kaj trovas bonan akcepton de gastoj.


En Pekino cirkulas popoldiro: “Kiu vizitis Pekinon sen manĝi rostitan anason, tiu vane pagis la vojaĝkoston.” La fama pekina rostita anaso havas historion de pli ol tricent jaroj. Ĝi estas preparita el anaso speciale bredita, havas delikatan viandon kun haŭto fragila kaj ruĝkolora, plaĉe bonodoras kaj estas grasa sed ne senapetiga. Ĝi estas tradicia plado ŝatata de ĉiuj ĉu junaj ĉu maljunaj. En Fangŝan-restoracio en Bejhaj-parko oni povas ĝui ali-

specajn frandaĵojn. La nomo de la restoracio “Fangŝan” signifas imiti la kuirarton de la imperiestra kuirejo de Ĉing-dinastio. La pladoj de la restoracio estas brile impresantaj kolore, odore kaj guste kaj konservas la originalan stilon de la imperiestraj pladoj de Ĉing-dinastio. Por turistoj estas ankaŭ granda ĝuo gustumi “imperiestrajn manĝaĵojn” en la restoracio.

La specialaj metiartaĵoj de Pekino estas plastika kaj ornama arto ĉefe por apreco kaj dekoraĵo. Abundas la specoj, delikatas la arto, longas la historio kaj riĉas la nacia stilo. Tiel frue kiel en la 20-aj jaroj de la kuranta jarcento, la specialaj metiartaĵoj de Pekino, kiaj jadaĵoj, eburskulptaĵoj, klozoneaĵoj, lakartaĵoj, inkrustitaj ornamaĵoj kaj artaĵoj, tapiŝoj, palacaj lanternoj kaj skulptitaj porcelanaĵoj, gajnis sinsekve oran medalon en la Panama Internacia Foiro kaj havigis al si renomon en la Internaciaj Foiroj en Londono, Nagoja kaj aliaj lokoj. Nun tiuj specialaj metiartaĵoj fariĝis memoraĵoj konkure aĉetataj de turistoj.

Inter la multnombraj komercaj stratoj de Pekino, la fama kultura strato Liŭliĉang allogas multajn turistojn. La strato estas ne longa, tamen havas longan historion de pli ol ducent kvardek jaroj. Post riparado kaj rekonstruado en la lastaj jaroj, la vendejoj ĉe ambaŭ flankoj laŭlonge de la strato rehavigis al si la originalan aspekton. Tradicie tie vendiĝas la kvar specoj de ĉinaj skribiloj: tuĉpeniko, tuĉbastoneto, papero kaj ŝtonplato, ankaŭ malnovaj kaj antikvaj libroj, kaligrafiaĵoj kaj faksimiloj de antikvaj ŝtonsteleoj. Turistoj de diversaj landoj, kiuj amas la ĉinan kulturon, certe ŝatos frekventi la straton kaj estos allogitaj de diversaj antikvaj kulturaj objektoj.

Fotoj de HAJ FENG



Parto de Pekino de LIÜ ÇUNGEN



Antikvaj konstruaĵoj en
la Imperiestra Palaco de LIŬ ĈUNGEN



Restoracio de rostitaj anasoj plena de klientoj





Famaj klozoneaĵoj produktitaj de Pekino


Sur la Granda Muro en aŭtuno de ŬEJ BO



Bongustaj kortegaj manĝaĵoj fari-taj de la restoracio Fangŝan



La hotelo "Granda Muro", unu el la novaj porturistaj hoteloj en Pekino



Knabino de akvoriĉa lando



Kokobredejo starigita de kamparaninoj

HONG JING:

Ĉinaj kamparaninoj hodiaŭ


Fotoj de ŜIN HŪA

Kolektado de trapoj





Kampaninoj



Plektado de bambua korbo

DE la lastaj jaroj la familia respondeca sistemo de laŭkontrakta produktado estas praktikata ĉie en la ĉina kamparo. Kampo estas kontraktata de ĉiu familio. La popola registaro kuraĝigas la kamparanojn energie fari aliajn produktojn krom bone kulturi la kontraktatajn kampojn. Tio kreis favorajn kondiĉojn por disvolvi la talenton de la kamparanoj.

En la pasinteco la kamparanoj ĝenerale sin okupis pri bredado de porkoj kaj kokoj. Tia enspezo povis kovri nur la ĉiutagan elspezon por manĝoleo, salo, saŭco, vinagro k.a. Sed nun, ili sin okupas per pli multaspecaj kaj grandskalaj flankokupoj, kiuj estas konsistiga parto de la socia varproduktado, sed ne per etkamparana ekonomio memsufiĉa. Ili vendas ĉiujn siajn produktaĵojn al la socio kaj tia enspezo jam konsistigas konsiderindan parton en la familia enspezo. Statistikoj pri cent familioj en du subdistriktoj de Gŭangdong-provinco montris, ke tri kvinonoj de la edzinoj enspezas pli multe ol iliaj edzoj. Iuj edzoj eĉ laŭdas siajn edzinojn kiel "ĉefministrojn" de la familioj.

Multaj revuoj de Ĉinio publikigis artikolojn pri progresemaj virinoj aperintaj en la kamparo.

Ĉe la bordo de la Flava Rivero en Henan-provinco estas pli-ol-50-jara kamparano Li Fengjun. Ŝia hejmloko estis tre malriĉa en la pasinteco kaj tie ĉiuj familioj vivis de ŝtata monhelpe. En 1979, responde al la alvoko de la popola registaro "sin riĉigi per siaj diligentaj manoj", ŝi ekbredis tri kuniklojn. Ŝi serioze studis la sciencajn metodojn de kuniklo-bredado kaj post unu

jaro la nombro de ŝiaj kunikloj jam superis pli ol mil. Per sia enspezo ŝi aĉetis farun-muelilon, riz-muelilon, man-traktoron, semmaŝinon, elektran segilon k.a. Laŭ ŝia aranĝo ŝiaj filo kaj bofilino servis, per tiuj maŝinoj, al samvilaĝanoj en iliaj produktado kaj ĉiutaga vivo. Dank' al tio, ŝia familio ne nur faciligis la vivon de la samvilaĝanoj, sed ankaŭ pliiĝis sian enspezon. En tiu jaro la enspezo el la industria prilaborado kaj flankokupo atingis pli ol 30 000 jŭanojn (ĉ. 2.5 jŭanoj egalas al unu usona dolaro). La lokaj kamparanoj laŭdis ŝian kapablon.

En la Interna Mongolio estas respektata mongola dommastrino Mudan. Ŝia edzo laboras kiel estro de produkta taĉmento kaj zorgas pri ĝia produktado. La 4.6 hektaroj da kampo, kontraktataj de la familio, devas esti kulturataj ĉefe de Mudan. Krom terkulturado, ŝi paŝtas ankaŭ unu ĉevalon, 50 ŝafojn kaj bredas kvin porkojn. Antaŭ nelonge ŝi kaj ŝia edzo konstruis gren-prilaborojn. Tial ŝia familio fariĝis la unua familio sin okupanta samtempe pri industria prilaborado, terkulturo kaj brutobredado. La jara enspezo de ŝia familio atingis proksimume 10 000 jŭanojn. Ŝia edzo bone scias, ke tion rezultigis la diligenta laboro de la edzino.

En vilaĝo de nordorienta Ĉinio troviĝas pli-ol-20-jara ŝafpaŝtistino Ĝjang Ĉiŭlan, kiu nove edziniĝis. Ĉirkaŭ la vilaĝo etendiĝas senlima herbejo. Subtenate de sia edzo ŝi komencis paŝti ŝafojn. Neniu lokano sin okupis pri tia laboro, tial oni mire rigardis la novedzinon en paŝtado kaj nomis ŝin ŝafpaŝtistino. En tri jaroj la nombro de la de ŝi paŝtataj ŝafoj atingis pli ol 40



Post rikolto de marestaĵoj

kaj ŝi vendis al la ŝtato 160 kg. da bonkvalita ŝaflano en nur unu jaro. Inspirate de ŝi ankaŭ aliaj 23 familioj en la vilaĝo bredis ŝafojn.

En Siĉŭan-provinco estas du perlo-kulturan-taj knabinoj: 20-jara Ŭang Ĝenglan kaj 19-jara Ŭang Ĉjang. Post kiam Ŭang Ĝenglan malsukcesis en la enira ekzameno por alta lernejo, ŝi restis tamen plena de fido al sia estonteco kaj decidis fari kontribuon en konstruado de sia hejmloko. Ŭang Ĉjang, ŝia bona amikino, kune kun ŝi lernis en la kurso pri perlo-kulturado antaŭ tri jaroj, funkciigata en la proksima loko, kaj poste ambaŭ knabinoj veturis longan vojon al la Akvoprodukta Instituto de la urbo Ĝangĝjang kaj lernis de iu profesoro, kiel selekti perlamotojn kaj rikolti perlojn. Ellerninte la teknikon, ili revenis al sia hejmloko. Por certiĝi, ke ankaŭ ilia montregiono kun malalta temperaturo estas taŭga por kulturi perlojn, spite la someran varmegon, ili foje-refoje iris en la lageton profundan ĝis la talio kaj elprenis el rokfendoj

kotoplenaj pli ol 1 000 perlamotojn, el kiuj ili trovis brilajn globetojn. Ili forte ekĝojis, rapide kolektis sumon da mono kaj aĉetis bonrasajn perlamotojn. Dum tri jaroj ili kulturis sume 5 000 perlamotojn, el kiuj ili kolektis 15 kg. da perloj, kiuj kostas 40 000 jŭanojn. Se oni faros el ili altvalorajn ornamaĵojn kaj medikamentojn kaj vendos ilin en la internacia merkato, oni povos interŝanĝe akiri fremdajn valutojn urĝe bezonatajn por la ŝtata konstruado.

La gubernio Huj'an, situanta ĉe la sudorienta marbordo, estas unu el la gravaj fiŝejoj de Fuĝjan-provinco. Tie la viroj, krom fiŝado en la maro, senescepte laboras aliloke kiel ŝtonhakistoj aŭ masonistoj; kaj la dommastrumado estas plenumata ekskluzive de la virinoj. Antaŭ ol la viroj ekveturas al fiŝado en la malproksima maro, la virinoj devas porti al la fiŝboatoj dolĉakvon, grenon, brullignon kaj glacierojn por frostigi la fiŝojn. Post kiam la boatoj revenas, la virinoj devas senprokraste vektporti freŝajn fiŝojn al la urbo por ilin vendi. Dank' al praktikado de la respondeca sistemo de laŭkontrakta produktado pli forte levigis la aktiveco de la virinoj. En iu vilaĝo 500 junaj kaj mezaĝaj virinoj sin organizis en kvin produktajn grupojn por plekti fiŝretojn, transporti lignon, prilabori akvoproduktaĵojn kaj grenojn kaj administri 10-hektaran laminarian kultivejon. Nur per tiuj produktoj ili enspezas 450 000 jŭanojn ĉiujare, kiuj konsistigas 20% de la totala enspezo de la vilaĝo, tiel ili faras grandan kontribuon por riĉigi la vilaĝon kaj ŝanĝi la fizionomion de sia hejmloko.

MONATO

internacia magazino sendependa

UNIKA REVUO EN ESPERANTO

Vere alternativa laŭ multaj aspektoj.

Unu el la plej prestiĝaj
esperanto-revuo

Inform-riĉa, bele ilustrita.

Petu inform-materialon de:

MONATO, Frankrijklei 140
B-2000 Antwerpen, Belgio.

TERMOFONTOJ DE ĈINIO

de ŬEN LI

TERMOFONTOJ dissemiĝas sur la ĉina teritorio kun areo de 9.6 milionoj da kvadrataj kilometroj. Ĉinio estas unu el la landoj plej abundaj je termofontoj. Laŭ statistiko, ĝi havas pli ol 2 000 termofontojn kun temperaturoj malalta (20°-40°C), mezalta (40°-60°C), alta (super 60°C) kaj eĉ pli alta (super 100°C). Laŭ la akva kvalito ili estas dividitaj en termofontojn purakvan, sulfuran, karbonacidan, salan, sodan kaj radioaktivan.



Junnan, kiu havas pli ol 400 termofontojn, estas konata kiel provinco kun plej multe da termofontoj en Ĉinio. Ili dislokiĝas ĉefe en Djanĉi kaj Tengĉong, kaj

Sprucado de tervarma fonto en Tibeto



la lasta estas nomata "loko de tera varmo". Ĉie en Liŭhŭangtang ŝprucas termofontoj. Tie ofte ŝvebas varma nebulo kaj la pejzaĝo estas mirinde ĉarma. El la pli ol 100 termofontoj de Taj'ŭan-provinco la plej famaj estas tiuj de Jangmingŝan, Bejtoŭ, Gŭanziling kaj Siĉongŝji. La termofonto de Bejtoŭ tutjare ŝprucigas akvon de 100°C. La termofonto de Hŭaĉingĉi en Lintong, Ŝenŝji-provinco, estas tre fama pro sia bela pejzaĝo. Ankaŭ la Ĉinghaj-Tibeta Altebenaĵo abundas je termofontoj. Tie sur la montoj estas blanka neĝo kaj sub ili vaporas termofontoj, kio formas originalan naturan pejzaĝon. Cetere, la termofonto de Ŝjaŭtangŝan en Pekino, tiu de

Matensuna Kiosko ĉe la termofonto de Hŭaĉingĉi en Sĵian



En la Suda Termofonto en Ĉongĉing

Conghŭa en Kantono kaj tiu de Luŝan en Ĝjangŝji allogas vizitantojn en- kaj eksterlandajn per sia ĉarma pejzaĝo.

La termofontoj el diversminerala akvo povas kuraci 20-30 malsanojn, kiel reŭmatismo, korpo-difektiĝo, neŭralgio, hipertensio, artrito, intesta kaj stomaka ulceroj kaj virinaj malsanoj. Laŭ medicina verko, antaŭlonge la ĉina popolo ekuzis termofontan akvon por kuraci malsanojn.

Multnombraj termofontoj havas abundon da tera varmo. Estas pli kaj pli vaste uzata la varmo de termofonto en la ĉiutaga vivo kaj industria kaj agrikultura produktado. Ĉinio jam akiris rimarkindan sukceson en utiligo de tera varmo por produkti elektron. Ĉinio estas ankaŭ unu el la landoj, kiuj plej frue utiligis termofontojn por disvolvisian agrikulturan produktadon. Antaŭ pli ol 1 000 jaroj oni komencis utiligi en frosta vintro termofontan akvon en kulturo de plantoj kaj provizis la kortegon per melonoj jam en la mezo de februaro. Nun oni uzas termofontan varmon por kulturi legomojn kaj melonojn, bredi fiŝojn kaj salikokojn, sekigi agrikulturajn kaj kromokupajn produktaĵojn, kovi ovojn kaj varmigi ĉambrojn.

SOMERA TRAVIVAĴO

(NOVELO)

I

Tion mi travivis en la somero de la pasinta jaro.

En nia familio estas du membroj: mi kaj mia kvar-jara filino Ŝaŝa. Printempe de la pasinta jaro ni transloĝiĝis en tri-ĉambran apartamenton kun balkonoj.

La granda loĝejo tamen kaŭzis al mi tri maloportunojn. Unue, estas ŝarĝo por mi ordigi la ĉambrojn. Due, ni loĝas pli malproksime de la infanĝardeno kaj tial mi devas dufoje ŝanĝi la aŭtobuson por akompani Ŝaŝa tien. Trie, nian familion subite ekvizitis nova gastino Jang Na. Iam mi vidis ŝin en la hejmo de mia

amiko. Post nia transloĝiĝo ŝi kaj mia amiko venis rigardi nian novan domon, tiel ŝi fariĝis nia ofte vizitanta gasto . . . ŝajne ne decas opinii tion "maloportuno".

Jang Na estis tre bela.

Ankaŭ la patrino de Ŝaŝa estis tre bela. Ŝi ĉiam zumis jenan kanton:

Amo tre similas vagabondon,

flugas ĝi libere kiel birdo.

. . . .


Mi, nur 32-jara, estis jam nihilisma al la amo. Ĝi ne estas tiel videbla kiel sporta konkurso mezurebla per minuto, sekundo, centimetro. Mi decidis neniam reedziĝi. Mi kategorie rifuzis helpojn de multaj svatantoj kaj petojn de memproponitoj. Tion kompreneble mi ankaŭ aludis al Jang Na.

Ŝi tenis sin grandsinjorine. Ŝi rigardis la aliajn, ĉiam kun iom levita mentono. Dume ŝi subite ridetis, montris plaĉajn sulketojn ĉe la buŝanguloj kaj diris: "Vi tre malfeliĉa."

Ne. Mi nur deŝiriĝis de la malfeliĉo. Ŝiaj brovoj estis tiel maldikaj. Ŝi venis ne pro mia malfeliĉo.

II

Mi ofte estis la lasta, kiu iris al la infanĝardeno por hejmen revenigi la infanon. Mi laboris kiel trejnisto de la Vira Korbo-pilka Teamo de nia provinco. Mi povis fini mian laboron nur post la plenumo de trejna plano.



Tiun tagon frue finiĝis la trejnado. Estis maja venta tago, ofta en norda Ĉinio. Ĵus vespermanĝis la infanoj. Iuj ludis en la korto, kaj ilia rigardo fiksiĝis sur la pordo. Tuj ĝojkriis tiu aŭ alia infano, kiam ties patro aŭ patrino venis.

Ŝaŝa ne estis en la korto. Mi paŝis al la klasĉambro, kie ŝi kaj ŝiaj kamaradetoj rondiris, geste kantante infankanton.

“Ŝaŝa, jen via patro,” mallaŭte diris al Ŝaŝa juna instruistino, kiu manklakante iris en la rondo, kun klinita korpo. Eble ŝi estis nova gvidanto de la grupo. Antaŭe mi ne vidis ŝin.

Ŝaŝa turnis la kapon kaj pafis rigardon al mi. Ŝi aliris tra la rondo, malordigante la vicaron. Ŝi silente etendis la manon al mi, kaj mi, preninte ŝin je la mano, elĉambriĝis.

“Momenton, trejnisto Ŭang!” kriis la instruistino. “Vidu, jam rompiĝis kudreroj de ŝia vesto. Petu ŝian patrinon rekudri por ŝi.”

“Jes, jes,” mi respondis obtuze.

“Mi ne havas patrinon. Paĉjo kaj panjo jam eksedziĝis,” intermetis Ŝaŝa.

Tio estis fakto. La infano diris la veron. Sed mi treege embarasiĝis.

“Aĥ, pardonon. Mi ĵus prenis la laboron gvidi tiun grupon. Mi ne informiĝis pri via afero,” ŝi ruĝiĝis, kaj ŝi estis pli embarasita ol mi.

“Ne gravas. Mi rekudru. Tion mi neglektis,” mi konsolis ŝin.

Ni eliris el la infanĝardeno kaj enpuŝiĝis en aŭtobuson. “Kiel nomiĝas via nova instruistino?” mi demandis Ŝaŝa.

Ŝi skuis la kapon.



Sia instruistino ne estis tiel bela, kun okuloj ne grandaj, frunto malalta kaj staturado ne tre svelta. Ŝi havis grandan buŝon kaj malgrandan plaĉan nazon. Min plej profunde impresis ŝia kurmaniero. Elirinte el la klasĉambro ŝi kuris kelkajn paŝojn; kaj returne al ĝi ŝi ankaŭ kuris kelkajn paŝojn. Ŝiaj paŝoj estis malpezaj, graciaj, altgravitaj, ritmaj. Nelonge post trejniĝo ŝi povus plenumi 100-metran kuradon per 12"5. Ŝiaj kruroj estis tre longaj.

Reveninte hejmen, mi metis kuirpoton sur la fornon kaj ko-

mencis rekudradon por Ŝaŝa. Sidante sur benketo, ŝi forigis nemangeblaĵojn de tub-ajlo. Ĝi estis tiel akra, ke ŝi devis froti la okulojn per malpura mano. De la ŝtuparo alportiĝis klara paŝbruo. Mi konjektis, ke tio estas Jang Na. Mi enŝrankigis la veston. Mi timis, ke ŝi afekte transprenos la veston kaj diros per la modulita tono: “He, vi tre malfeliĉa.”

Efektive Jang Na. Kun rideto ŝi staris ĉe la pordo. Ŝi portis blankajn altkalkanumajn ŝuojn, blankan longmanikan trikotajon kun milde blua broĉo sur la brus-

to kaj ore borderitan jupon el nigra veluro. Ŝiaj nigraj, longaj haroj estis loze kombitaj sub granda ornama arko. Ŝiaj okuloj estis brilaj, haŭto delikatkolora. Ŝi estis belega. Tion ŝi bone sciis, eble tion ŝi rimarkis en mia mira vizageŝprimo. Ŝi radiis per brilo, plenis de memfido.

Kun balancita mansako el artefarita krokodila ledo subbrake, ŝi klinis iom la korpon kaj ride- tis: "Mi venis denove."

"Envenu," mi diris.

Ŝi enĉambriĝis antaŭ mi kaj elsakigis skatolon da delikata ĉokolado.

"Jen donaco al Ŝaŝa pro ŝia naskiĝtago, el Svislando."

"La sekvantan monaton estos ŝia festo, la 16-a," mi diris.

"Ĉu?" ŝi eksplodis per ridego. Ŝi estis ridema, sed ridis ne dol- ĉe. Ŝi ridegis ne pro neretenebla ĝojo, sed ŝajne provis estigi ĝojon per ridego. Ŝia rido povis iam ajn aperi kaj iam ajn ĉesi. "Do mi povos denove veni la sekvan- tan monaton. Ĉiufoje mi devis rompi al mi la kapon por serĉi pretekston. Vi tre ruza!"

Ŝi gracie sidis sur sofo, kun malkovritaj rondaj genuoj.

"Vi devas aĉeti meblaron. Se vi volas, mi estu via konsilanto."

"Poste," mi ne donis sinceran respondon.

"Kiam do?" Ĉu en la tago, kiam vi regalos min per bombo- noj pro via reedziĝo?" ŝi ridis denove.

Tian ŝercon mi abomenis. Jam bolis la akvo en la kuirpoto. "Mi devas prepari manĝon. Sidu ĉi tie," mi diris.

Ŝi ŝaltis magnetofonon, sed subite sin turnis al mi: "Lasu tion al mi. Mi scias fari pladojn. Ĉu estas babuŝoj?"

En miaj babuŝoj ŝi iris tien kaj ĉi tien. Kia aĉaĵo!

"Mi kuiras vermiĉelojn nur kun kelkaj ovoj."

"He, vi tre malfeliĉa," ŝi sus- piris. Ŝi iris al balkono, kun li- ana seĝo.

III

Ŝaŝa havis karakteron neordi- naran. Ŝi vivis en malharmonia familio. En ŝia unujara aĝo ĉiu- nokte mi prenis ŝin en la brakojn por dormigi ŝin: "Mia kara, via panjo en balo. Ne ploru, ne." Pli aĝa, ŝi ofte suferis riproĉon de la panjo: "For al via kara paĉjo!" aŭ mian koleron: "Al via panjo, ŝi ankoraŭ vivas!" Ŝaŝa havis ja temperamenton. Pro io malplaĉa al ŝia koro ŝi tuj akute ekkriis, eĉ antaŭ la gastoj en la hejmo. Ŝi, knabineto de nur du kaj duona jaroj, jam sciis ĵeti objekton por verŝi sian koleron. Mi kaj ŝia patrino surpriziĝis de tio, sed ne trovis konvinkajn vortojn por ŝin kritiki — ŝi imitis nian agmanie- ron!

Antaŭ unu jaro ni romp- is la rilatojn. Ŝaŝa neniam demandis pri sia patrino. Tio estas terura, tremiga. Ŝi havis ombron en la koro, tre tre grandan ombron. Kelkfoje, kiam mi nokte vek- iĝis, mi rigardis la diketan filinon profunde dormantan apud mi kaj sentis en mi korŝiran memripro- ĉon. Kulpis ne la infano, sed ni.

Tiutage, ĉirkaŭ duonmonaton post mia interparolo kun ŝia in- struistino, mi kiel kutime malfruis al la infanĝardeno. Survoje mi aĉetis ruĝan balonon.

"Ĉu ĝi plaĉas al vi, Ŝaŝa?" mi volis ridigi ŝin.

"Ĉu ĝi povas leviĝi super nu- bojn?" la juna instruistino trans- prenis la balonon kaj demandis.

La instruistino ankoraŭ havis iom da infana karaktero. Mi do- nis jesan respondon.

"Bone tenu ĝin, Ŝaŝa," la in- struistino volvis la balon-fadenon ĉirkaŭ ŝia fingro. "Ĉu vi ŝatas?"

"Dankon, paĉjo," Ŝaŝa direk- tis la okulojn al mi. Ŝia vorto in- teresis min multe pli ol la ruĝa balono.

Tremetis mia koro. Ŝia simpla vorto ege kortuŝis min. La kna- bino fariĝis ĝentila. Antaŭe ŝi ne sciis danki, ŝajne neniu el ŝiaj akiritaj ludiloj estis interesa por ŝi, kaj ŝi eĉ ĵetis ian ludilon sur la plankon, antaŭ ol forlasi ven- dejon.

Mi tre volis kisi ŝin, sed la instruistino tuj ekscitiĝe prenis ŝin en la brakojn, kisis ŝin kaj forte brakumis ŝin dirante: "Ŝaŝa tre saĝa! Tre obeema! Vere bona infano!"

Mi ekŝatis la instruistinon.

Mi, malatenta patro, eĉ rimar- kis foje, ke iu butono sur la vesto de Ŝaŝa estis alkudrita ne de mi, kaj aliffoje, ke ŝia vesto estas gar- nita per nova elasta manumo. Ŝaŝa havis fervoran instruistinon.

Iutage tre malfrue finiĝis trej- nado. Pasis ĉirkaŭ unu horo, de kiam oni devis hejmen revenigi siajn infanojn. En la klasĉambro estis nur la instruistino kaj Ŝaŝa.

Mi iris en la ĉambron, kaj Ŝaŝa, ekvidinte min, tuj stariĝis. La instruistino glatigis ŝian ves- ton per la manoj.

"Pardonon pro mia malfruiĝo," mi diris.

Ekridis la instruistino. Ŝia buŝo estis tre granda, kun elmon- trita orda dentaro.

"Kie vi loĝas?" ŝi demandis.

"Ĉe la strato Ĝongŝannanĝe."

"Bonege. Ankaŭ mi loĝas tie. Por ke vi ne longe iru de via

Sporta Komisiono, de nun mi akompanu Ŝaŝa hejmen,” ŝi proponis.

“Ne estas oportune veturi kun infano per plene ŝarĝita aŭtobuso. Estonte mi venos kiel eble plej frue. Dankon.”

“Ankaŭ paĉjo diris dankon,” Ŝaŝa kriis manklakante. Ni ekridis. Ŝaŝa malembarasis min.

Mi rifuzis la instruistino. Sed post nelonge ŝi sin turnis al ni.

Pro tonsilito Ŝaŝa ne vizitis la infanĝardenon du tagojn. La sekvantan vesperon sonis fremda frapado al la pordo. Estis ŝi.

Granda malordo en la domo: lito ne ordigita, manĝilaro ne lavita, balailo en la mezo de ĉambro kaj ŝtrumpetoj sur la dorsapogilo de seĝo. Mi neniam kapablis fari ordaranĝon.

Ŝajne ĉion tion la instruistino ne atentis. “Kio okazis al Ŝaŝa?” ŝi demandis maltrankvile.

“Ŝi febras, je 39 gradoj.”

“Instruistino! Instrukistino!” vokis Ŝaŝa, aŭdinte ŝian voĉon.

La instruistino kuris en la ĉambron, Ŝaŝa etendis la manon kaj tiris ŝin. Ĉi tiu lipis ŝian frunton kaj diris: “Varmega, kiel fajro.”

“Kion vi alportis al mi, instruistino?” demandis Ŝaŝa.

Tiu knabino eĉ volis elpeti ion!

La instruistino elprenis malsekan plastan sakon el sia desegnitakromsako.

“Kio?” demandis Ŝaŝa.

“Mia naĝkostumo.” Ŝi metis la kostumon flanken, elprenis staketon da papero kaj diris: “Tion mi donacas al vi. Ĉu vi scias, kio ĝi estas?”

“Blanka papero,” Ŝaŝa foliumis la paperon kaj malespere diris.

“Ne . . . Jen hundeto, jen boato, jen rano, jen kamelo, jen ĝiba maljunulo . . . Prenu paperfoliojn unu post alia.” Per siaj lertaj manoj ŝi rapide faris per faldo diversajn objektojn kaj dislokis ilin sur la lito.

Mi trankvile deiris kaj ŝaltis televidilon. Tiuvespere oni tele sendos bildbendon pri korbopilka finalo inter Sovetunio kaj Usono en la Monda Studenta Sport-kunveno. Pro mia profesio mi devos rigardi.

“Ĉu vi havas verdajn fabojn?” post momento ŝi venis en mian ĉambron kaj demandis.

“Ne.”


“Kaj kuirpoton?”

“Jes, en la kuirejo. Ha, trafo!” mi estis alforĝita al la televidilo. La usona ludisto n-ro.11 tre bele enkorbigis la pilkon.

“Instruistino!” vokis Ŝaŝa.

“Tuj,” respondis la instruistino, kiu staris malantaŭ mi. Ankaŭ ŝi absorbiĝis en televido. Ŝi ekridis, aŭdinte la voĉon de Ŝaŝa. “Kie la poto? Mi havas verdajn fabojn. Ŝi ŝatas kaĉon el tiaj faboj. La poto!”

Mi rapidis al la kuirejo, donis al ŝi la poton kaj rizon kaj reku-



ALIA NOVA KOLEKTO DE ĈINAJ POPOLAJ RAKONTOJ

eldonita de la Ĉina Esperanto-Eldonejo

La Feliĉa Birdo

Ĝi enhavas tri interesajn kaj kortuŝajn rakontojn de tibetanoj: "La Feliĉa Birdo", "Rano-rajdisto" kaj "Ĝomaĝi". Ili rakontas, kiamaniere oni trovis la feliĉan birdon, kial la rano transformiĝis en rajdiston, kaj rakontas ankaŭ la ĝojon kaj malĝojon, disiĝon kaj kuniĝon de la bela feino Ĝomaĝi kaj la reĝido.


Formato: 110×180 mm. 56 pĝ.

Prezo: £0,50 US\$0,95

Numero: 10-Es-1866P

Mendu ĉe: Libroservo de UEA
Perantoj de EPC

aŭ Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio
(GUOJI SHUDIAN), Esperanta Sekcio,
P. O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio



ris al la ĉambro. "Via knabino malsanas en tia horo!" ŝi ridis.

Dum la kuirado de kaĉo ŝi navetis inter la televidilo kaj mia filino. En nia tuta domo leviĝis ŝiaj hasta paŝbruo kaj gaja rido.

Usonanoj gajnis la ludon. Ŝaŝa endormiĝis post la manĝado de la fabokaĉo. Mi rimarkis la ĉambbron ordigita. Ŝi volis foriri.

Mi subite petis ŝian nomon.

"Mej Ĉing," ŝi respondis ridete.

Oni bonhumoriĝis aŭ pro plezuriga vino aŭ pro bela kanto aŭ pro plaĉa filmo. Mi pensis, ke mi akiris bonan animstaton pro brila konkurso de pilkludo. Jen la plej brila el la pilk-konkursoj spektitaj de mi.

La sekvantan tagon mi ordigis la tri ĉambrojn. Mi aĉetis kvin surbastonetajn laktajn glaciaĵojn kaj konservis ilin en la fridujo

por prepari glacian kremajon por ŝi, kion Jang Na instruis al mi.

La vespera strato estis vigla, movoplana kaj prilumata de intermitantaj lumoj ruĝa, oranĝa kaj verda ĉe semaforo. Mi vidis ŝin moviĝi al nia domo de stratangulo. Ŝi iris rapideme kaj kiel kutime kuretis malpeze, gracie, firme, prilumata de buntaj lampumoj.

(Daŭrigota)

Vojo de malliberulo

NEORDINARA PREZENTADO

Virino de pli ol 50 jaroj iom ŝanceliĝe paŝis en aktoran vestoŝanĝejon. Kiam ŝin ekvidis aktoro, kiu estis demetanta la kostumon post ludo de la ĉefrolo Lin Ĉing, liaj lipanguloj ekkonvulsiiis kaj liajn okulojn rapide plenigis larmoj, kiuj ruliĝis sur lia ŝminkita vizaĝo . . .

La kortuŝaĵon mi vidis post kuliso, kiam oni finis prezentadon de la granda sep-scena ŝanhaja opero "Vojo sub Viaj Piedoj", iuvespere de la lasta malfrua somero en la Halo de la Ŝanhaja Magistrato.

La opero ne estis ordinara. Ĝiajn verkadon, reĝisoradon, komponadon, prezentadon kaj muzikil-ludon, dekoraciadon kaj scenejan lumigadon plenumis opera trupo el 35 malliberuloj. La opero bazita sur fakto konigas la vivon de malliberulo: Junulo Lin Ĉing malliberigita antaŭ nelonge rifuzis reedukon sub la influo de alia malliberulo Ma Feng. Post sia liberiĝo Ma Feng friponis en la hejmo de Lin Ĉing, kio pli danĝerigis la malsanon de la patrino de Lin Ĉing. La gvidinstanco de la malliberujo permesis al Lin Ĉing viziti sian patrinon. Kiam li vidis ŝin agonianta, li malamegis Ma Feng kaj pentis pri sia krimo. Kaj de tiam li iris sur novan vojon.

Lin Ĉing estis ludita de junulo U Bin, la komponinto de la opero, iama fama komponisto kaj aktoro en la Unua Ŝanhaj-opera Trupo. En aŭgusto 1983 li estis kondamnita al kvar-jara mallibereco pro kanajlaĝo. La virino, kiun li vidis en la vestoŝanĝejo, estis s-ino Ĝoŭ, prezidantino de la arta komisiono de la trupo, kiu faris grandan klopodon por kulturi lin. Kiel tio povus ne vekti ĉe li svarmon da doloraj rememoroj.

PENTO EN MALLIBEREJO

La sekvantan matenon mi venis al la Ŝanhaja Malliberujo. Tie mi havis interparolon kun U Bin.

. . .

Dankon, dankon! Jes, mi larmis. Mi larmis preskaŭ dum ĉiu prezentado. En Lin Ĉing mi vidis mian figuron. Mi tremis tra la tuta korpo, precipe kiam mi ludis en la sceno "Lin Ĉing hejmen revenas por viziti sian patrinon".

Malliberulo U Bin, komponinto de la opero, ludis la rolon de Lin Ĉing.





*Caŭ Ŭejjin, la fianĉino de malliberulo
Gu Ĝjanĉjang, estas elstara vartistino.*

Mi pentis kune kun Lin Ĉing profunde kaj korŝire.

Mi jam ne havas gepatrojn, sed havas virtan edzinon kaj ses-jaran filinon. (Kun larmoplenaj okuloj li levis la kapon, kvazaŭ li volus retrofluigi la larmojn, tamen la larmoj rivere fluis sur liaj vangoj.)

Mi tre amas ilin. Jes, tre amas . . . (Li mordis la lipojn, tamen la lipoj tremetis senĉese.) Mia edzino esperis, ke mi fariĝos drako, sed nun. . . vermo.

(Iom poste li kvietiĝis.) Mi pentis tro malfrue! Ĉe la komenco, kiam oni enprizonigis min, mi tute malesperiĝis. Sed la gvidinstanco de la malliberejo lasis min aniĝi al opera trupò de malliberuloj. Iom post iom mi vidis lumon de la vivo. Precipe post kiam mi legis la libreton "Vojo sub Viaj Piedoj" verkitan de alia

malliberulo, mi kredis, ke mi havos bonan perspektivon, nur se mi rebonigos min kiel Lin Ĉing. Sekve mi volonte kaj fervore komponis la operon, kaj por tio mi uzis nur iom pli ol unu semajnon.

Kiel mi trovis la ĉefan melodion? En la unuaj tagoj post mia enkarcerigo mi aŭdis, ke iu malliberulo zumas melodion pri sopiro al patrino. Ĝi estis profunda kaj ondiĝa kaj taŭgis por esprimi penton kaj esperon. Sur ĝia bazo mi ellaboris la ĉefan melodion.

Hieraŭ post nia prezentado sino Ĝoŭ vizitis min. Ĉu vi vidis ŝin? Jes, mi tre emociiĝis. Oni ne forĵetis min. Nun naskiĝis ĉe mi pli kaj pli forta deziro reveni al la scenejo. Antaŭe mi verŝis mian energion sur krimojn kaj tial mi ne havis sufiĉe solidan

bazon en arto, kvankam mi iom progresis. Mi devas plene utiligi la favorajn kondiĉojn kreitajn de la registaro kaj kapti ĉiun minuton por lerni sciojn.

. . .

ESPERO DE FAMILIANOJ

La pento en malliberejo vekis grandan resonon en la socio. Post rigardo de la supre menciita opero oni ekkonis la sentojn de malliberuloj, ilian deziron fariĝi nova homo kaj simpatiis al ili. Precipe post kiam iliaj familianoj rigardis la operon, tiuj estis multe kortuŝitaj. En unu semajno la Ŝanhaja Malliberejo ricevis 374 leterojn senditajn de la familianoj, en la leteroj ili esprimis sian deziron helpi la registaron eduki la enkarcerigitajn.

"Mi rigardis la operon en larmado. La realeco kaj kredebleco



Unu el la scenoj de la opero: La grave malsana patrino admonas sian krimintan filon, ke li denove komencu sian vivon.

de la intrigoj portis al la prezentado grandan sukceson," skribis Caŭ Ŭejjin, la fianĉino de iu malliberulo. "Dank' al la pacienca edukado de registaraj oficistoj, Lin Ĉing finfine konsciis sian krimon kaj iris al nova vivo, kio profunde kortuŝis min."

Mi intervjuis ŝin en iu infanĝardeno. Tiu 24-jara infanĝardenistino diris al mi, ke la aresto de ŝia fianĉo forte pikis al ŝi la koron. Ŝi suspiris pri sia malbona sorto. Pro tio ŝi ofte iris al preĝejo. Iam ŝi eĉ volis rompi kun li la rilatojn.

Post rigardo de la opero ŝi ekpensis, ke la registaro savas lin ĉiamaniere, ŝi do havas pli grandan devon helpi lin. "Ĉiaokaze mi havigos al li esperon, ke li fariĝu nova homo. Mi nepre admonos lin al bonaj kondutoj kaj

diros al li, ke nova vojo estas tuj sub liaj piedoj."

En ŝiaj seriozaj okuloj mi kva-zaŭ vidis perspektivan vojon

etendiĝantan el la malliberejo, pretigitan de la registaro, la socio, la malliberuloj kaj iliaj familioj.

Malliberulo Ĉen Sjanŭen estas reĝisoro kaj aktoro de la opero.



TIBETO, LA SUDOKCIDENTA LIMREGIONO DE ĈINIO

de SUN MINGGEN


POR multaj homoj Tibeto estas fremda. Ĝia partikulara geografia situo, la ĉarma natura beleco, la interesaj moroj, kaj la brilaj kulturo kaj arto. . . ĉio estas alloga pro sia mistereco.

BELA KAJ RIĈA REGIONO

Tibeto estas nacieca aŭtonoma regiono de Ĉinio. En la nordo kaj oriento ĝi najbaras al la ĉinaj regiono kaj provincoj Ŝinĝjang, Ĉinghaj,

Praarbaro en Jadong

Foto de ĈENG ŜJI



Siĉŭan kaj Junnan, kaj en la sudo kaj okcidento ĝi najbaras al Birmo, Hindio, Bhutano, Sikimo, Nepalo kaj Kaŝmiro. Ĝia areo de pli ol 1 200 000 kvadrataj kilometroj konsistigas okonon de la totala areo de Ĉinio kaj ĝia loĝantaro nombras 1 898 000, el kiu pli ol 94 procentoj estas tibetanoj, kaj la ceteraj estas menbaoj, lŭobaoj, hanoj kaj hujoj.

Tibeto, nomata kiel la tegmento de la mondo, havas meznombran alton de 4 000 metroj super la marnivelo. Tie ĉiu ajn monto estas pli alta ol la ĉefpinto de Alpoj. En Tibeto montĉenoj interprete staras unu tuj post alia, kaj la montoj estas ĉiam kovritaj de neĝo. La norda Tibeto estas altebenaĵo servanta kiel la ĉefa paŝtejo, kiu konsistigas 2/3 de la tuta areo de Tibeto. La plej alta monto en la mondo Ĉomolangma kun absoluta alto de 8 848 metroj sidas meze de Himalajo sur la landlimo inter Ĉinio kaj Nepalo. La orienta Tibeto estas valregiono riĉa je arbaroj.

La montaroj de Tibeto kreskigas multajn glaciriverojn. Multaj grandaj riveroj de Azio fontas el Tibeto. La rivero Jarlung Zangbo fluas tra la sudo de Tibeto kaj poste en Hindion, kie oni nomas ĝin Brahmaputra. Ĝia parto en Tibeto longas 2 057 kilometrojn. Ĝia baseno estas nomata Zangnan-valo, kiu estas la grava bazo de agrikulturo de Tibeto. La ĉefaj urboj kaj pli ol duono de la loĝantaro koncentre loĝas en la valo. En Tibeto estas pli ol 1 500 lagoj grandaj kaj malgrandaj, kies totala areo konsistigas 30 procentojn de tiu de la lagoj de la tuta lando. La lagoj favoras fiŝbredadon kaj brutobredadon.

La vastega tero, la komplikaj geologia strukturo kaj topografio kaj la varia klimato dotis Tibeton per naturaj riĉaĵoj. Nun en Tibeto kreskas pli ol 5 700 specoj da altklasaj vegetaloj kaj vivas pli ol 600 specoj da diversaj birdoj kaj bestoj. La valoraj farmaciaj drogoj mosko, ursa galveziko, vegetala raŭpo, gastroduo, fritilaro, neĝlotuso k. a. ĝuas altan reputacion en kaj ekster la lando. Tibeto estas unu el la kvin grandaj bazoj de bruto-

En 1951 Tibeto estis pace liberigita. La foto montras, ke prezidento Maŭ Zedong intervidiĝas kun Ngapo Ngajang-Gigme, plenrajtigito de la tibeta registaro.



bredado kaj la dua granda arbara regiono en Ĉinio. Tie sub la tero konserviĝas pli ol 40 konstatitaj specoj da mineraloj. La akvoenergio kaj la subtera varmfonto estas la plej potencaj en la tuta lando. La sunenergio de Tibeto okupas la duan lokon en la mondo, nur malpli ol tiu en Saharo. Nun la naturaj energioj ekestis utiligataj de la loĝantaro.

LA HISTORIO DE TIBETO

En prahistorio Tibeto ne estis altebenaĵo. Esplorado en la lastaj jaroj montris, ke antaŭ bilionoj da jaroj la loko estis maro. Poste forta geologia movado faris la lokon la plej alta altebenaĵo de la mondo.

En la pasintaj pli ol 20 jaroj arkeologoj trovis en Tibeto multajn ruinojn de homa aktivado en paleolitiko kaj neolitiko. Tio pruvis, ke de antaŭ dudek mil jaroj tie jam vivis prahomoj. En la longa historio, la indiĝenoj formis la nunan tibetnacion, asimilinte la ĉjang-, mongol-, han- kaj aliajn naciecojn, kiuj migris tien de la nordo.

En la longhistoria formiĝado de la ĉina nacio tibetnacieco faris gravajn kontribuojn. En malfavoraj naturaj kondiĉoj, la tibetanoj, diligentaj kaj sentimaj, senlace laboris kaj kreis la brilan kulturon. Komence de la sepa jarcento, Sunzamkampo, la plej eminenta persono en la historio de Tibeto, unuigis la tutan Tibeton kaj fondis la sklavisman reĝimon Tubo. Li destinis ĉefurbon, faris leĝon, kreis skriblingvon kaj disvastigis bud-

hismon. De tiam Tibeto eniris en novan historian etapon kaj pli kaj pli oftigis ĝiaj kontaktoj kun aliaj regionoj.

La nuboskrapanta Himalajo baris al tibetanoj la vojojn al la sudo kaj okcidento, do ili turnis siajn kontaktojn al la nordoriento, nome la loko loĝataj de hanoj, la plej granda nacieco de Ĉinio. En historiaj notoj ne estis preciza registro de kiam komenciĝis rilatoj inter tibetanoj kaj hanoj. Arkeologiaj esploroj pruvis, ke antaŭ 4 000 jaroj jam estis kontaktoj inter la tibetaj indiĝenoj kaj la hanoj de la baseno de la Flava Rivero. Komence de la kvara jarcento Li Ŝjong, estro de la regno Ĉengdu en la periodo de Dek Ses Regnoj, fondis separatisman lokan reĝimon en la okcidenta parto de Siĉŭan najbara al Tibeto kaj de tiam malfermiĝis la vojo inter Ĉengdu (nun la ĉefurbo de Siĉŭan-provinco) kaj Lasao, tra irante la gravan urbon Ĉangdu en la oriento de Tibeto. En 586, la tribo Subi en la regiono de Lasao sendis tributi al la kortego de Suj-dinastio, kio markis certagradan evoluon de la interrilatoj de tibetanoj kaj hanoj. La regperiodo de la reĝimo Tubo, de la komenco de la sepa jarcento ĝis la mezo de la naŭa, koincidis kun tiu de Tang-dinastio. La kontaktoj inter la du reĝimoj kaj la du popoloj atingis altan tajdon. En 641, imperiestro Tajzong de Tang-dinastio edzinigis principon Ŭenĉeng al Sunzamkampo de Tubo, kaj poste imperiestro Gaŭzong nomumis lin per alta rango en la kortego. En 710 imperiestro Ĝongzong edzinigis principon Ĝinĉeng al Ĉidezuzan, la reĝo de Tubo, kaj poste



Partia kaj registara gvidantoj Hu Jaŭbang kaj Ŭan Li inter amasoj dum sia inspektado en Tibeto



La jadsigelilo, donita de Ĉing-dinastio al Banĉen Erdeni Foto de ĈENG ŜJI

tiu skribis al imperiestro Ŝjŭanzong: “Mi, nevo de la forpasinta imperiestra moŝto, estis honorita per edziĝo kun princino Ĝinĉeng, kaj de tiam ni fariĝis unu familio, kaj la tuta popolo ĝuas pacon.” En 822, delegito de imperiestro Muzong atingis Lasao, kaj en la nomo de imperiestro, tiu kontraktis kun la reĝo Ĉiĵaŭbaĝin de Tubo. Kaj tie ili starigis steleon pri renkontiĝo de “onklo kaj nevo”. La teksto de la steleo notis la deziron de la han-nacieco kaj tibet-nacieco pri eterna amikeco. La steleo ankoraŭ bone staras antaŭ la templo Daĝoŭ en Lasao. De 634 ĝis 846 en kiu disfalis la reĝimo Tubo, la regantaroj de Tang-dinastio kaj Tibeto reciprokis 191-foje delegitojn, kaj la popularaj kontaktoj estis pli oftaj. Kiam la du princinoj iris al Tibeto, kun granda nombro da metiistoj, artistoj, kaj granda kvanto da libroj kaj objektoj de han-nacieco. Tio enkondukis la avangardajn produktajn teknikojn kaj sciencajn sciojn en Tibeton kaj akcelis la progreson de ĝiaj ekonomio kaj kulturo. Princino Ŭenĉeng ĝis nun estas kultata kaj prikantata de la tibeta popolo. Statuoj de ŝi kaj Sunzamkampo estas kultataj en multaj temploj de Tibeto. Ankaŭ la tibeta kulturo enkondukiĝis en la regionojn de han-nacieco. Poloo de Tubo furoris dum Tang-dinastio. Inter la antikvaĵoj trovitaj en Dunhŭang de Gansu-provinco estas multe da tibetlingvaj klasikaj verkaĵoj de Tubo. Silko, teo kaj bonaj instrumentoj estis grandkvante enportitaj en Tibeton, kaj gruntbovoj, militĉevaloj,

ledo kaj farmaciaj drogoj estis elportitaj al la regionoj de han-nacieco. La oftaj interfluo en ekonomio kaj kulturo intimigis la du naciecojn, kio metis la bazon por aliĝo de tibet-nacieco al la granda familio de la ĉina nacio.

Meze de la 9-a jarcento finiĝis la reĝimo Tubo kaj aperis en Tibeto multaj malgrandaj reĝimoj. Ili militadis inter si kaj la ĥaoso daŭris kvarcent jarojn. Dume iuj el la reĝimoj submetiĝis al la han-nacieca reĝimo de Song-dinastio, kaj plie disvolviĝis komercado pri teo kaj ĉevalo inter la du naciecoj. Sed tiam ĉu la kortego de Song-dinastio aŭ iu el la reĝimoj en Tibeto ne kapablis unuigi la tutan Tibeton.

Estis la kortego de Jŭan-dinastio, kiu unuigis Tibeton doninte finon al la kvarcentjara militado. Jŭan-dinastio estis fondita de mongol-nacieco de Ĉinio en la komenco de la 13-a jarcento. Meze de la 13-a jarcento la kortego sendis trupojn en Tibeton kaj tiel finis la separatisman situacion. De tiam Tibeto oficiale eniris en la teritorian mapon de Jŭan-dinastio kaj fariĝis parto de la teritorio de Ĉinio. La centra registaro de Jŭan-dinastio helpis Saĝja-skolon fondi la lokan politik-religian reĝimon. Basiba, patriarko de Saĝja-skolo, estis nomumita de la kortego kiel Estro de Cent Tridek Mil Familioj. Poste li estis nomumita de imperiestro Ŝizu Kublajo de Jŭan-dinastio kiel “instruisto de imperiestro”. Li funkciis kiel altranga kortegano

TIBETO HIERAŬ KAJ HODIAŬ (I)

dum multaj jaroj kaj helpis la regantan mongolnaciecon krei novan skriblingvon. La centra registaro de Ĵuan-dinastio establis institucion speciale zorgantan la aferojn de Tibeto. Samtempe kun tio la registaro sendis delegitojn en Tibeton por ke ili nombru la loĝantaron, destinu imposton, starigu postiljonejojn kaj ekzamenu la lokajn oficistojn. De tiam oficiale komenciĝis efika regado de la centra registaro super Tibeto.

En sia regado super Tibeto Ming-dinastio imitis la farojn de Ĵuan-dinastio, kaj la tibeta registaro plie strikte rilatis al la centra registaro. Statistiko de la Etiketa Ministerio de Ming-dinastio konigas, ke en la sesdekaj jaroj de la 15-a jarcento ĉiujare tri- aŭ kvar-mil personoj de diversaj lokoj de Tibeto venis al la metropolo por tributi al la kortego. Pli oftaj estis la kontaktoj inter la popoloj de la du naciecoj. Dum ĉ. 300 jaroj de Ming-dinastio la tibetanoj kaj hanoj pace kunekzistis kaj kunlaboris, kio akcelis progreson de la patrolando.


Meze de la 17-a jarcento Ming-dinastio estis anstataŭita de Ĉing-dinastio fondita de manĉuroj, alia nacimalplimulto de Ĉinio. La kortego de Ĉing intensigis sian regadon super Tibeto. Imperiestroj Ŝunĝi kaj Kangŝji oficiale agnoskis respektive en 1653 kaj 1713 la kvinan Dalaj-lamaon kaj la Kvinan Banĉen Erdeni, kio faris Dalaj-lamaon kaj Banĉen Erdeni la plej altaj politikaj kaj religiaj regantoj de Tibeto. La kortego de Ĉing-dinastio destinis, ke la enoficiĝo de postaj Dalaj-lamao kaj Banĉen Erdeni validiĝos nur post agnosko de la centra registaro, kaj plie, destinis la funkciojn kaj detalaĵojn de organizado de la tibeta registaro. Ekde 1728 la centra registaro postenigis en Tibeto komisiiton de la centra registaro. Kune kun Dalaj kaj Banĉen, la komisiito superregis la administradon, militajn aferojn, juron, financon, nomumadon kaj eksigon de oficistoj; kaj cetere li monopoligis la eksterlandajn aferojn kaj konfirmis la renaskiĝon de Dalaj, Banĉen kaj grandaj vivaj budhoj. En 1793 la Centra Registaro de Ĉing-dinastio dekretis la «Imperiestran Ĉarton pri Tibeto», en kiu estis 29 artikoloj pri administrado de Tibeto. La ĉarto markis la plej altan stadion de la regado de Ĉing-kortego super Tibeto. En la cent jaroj post la publikigo de la ĉarto, la sociordo kaj paco de Tibeto estis garantiitaj. Hanoj, huoj, mongoloj kaj manĉuroj vojaĝis en Tibeton por

komerco aŭ turismo, kaj centoj da homoj de land-interno transloĝiĝis en Tibeton. Multaj specoj da legomoj estis enkondukitaj en Tibeton, kaj ili nun ankoraŭ portas la tiamajn nomojn.

Ekde la mezo de la 19-a jarcento imperiismaj landoj intensigis sian agresadon kontraŭ Ĉinio, kaj ankaŭ la monda tegmento ne povis eskapi de la katastrofo. Por defendi la integrecon de la teritorio de la patrolando, la tibetanoj brave batalis kontraŭ la agreso kunagante kun diversnaciaj popoloj de la lando. En 1841 la tibeta popolo frakasis la agreson al Ali-regiono fare de fremdlandaj fortoj subtenataj de imperiismaj landoj. En 1842, la tibeta popolo organizis volontulan trupon, kiu militiris al sud-orientaj apudmaraj regionoj por batali kune kun hanoj, manĉuroj kaj mongoloj kontraŭ fremdlandaj agresantoj. En 1888 kaj 1904 britaj trupoj rekte invadis Tibeton, kaj la tibetanoj sentime rezistis per tre primitivaj armiloj. Eĉ britoj ne povis ne konfesi, ke la braveco kaj saĝo de tibetanoj estas senprecedencaj en la mondo. Sed fine la tibeta popolo malvenkis pro la senkapableco kaj putreco de la kortego de Ĉing-dinastio, tamen la batalo de la tibeta popolo fias-kigis la fiintencon de la britaj imperiistoj fari perforte Tibeton kolonio.

Post pereco de Ĉing-dinastio la imperiistoj ŝanĝis siajn artifikojn. Ili nutris en la superaj regantoj de Tibeto proimperiismajn personojn kaj agitis ilin por sendependiĝo de Tibeto utiligante

La rivero Yarlung Zangbo Foto de LIŬ TJEŜENG



TIBETO HIERAŬ KAJ HODIAŬ (I)


la situacion de ĥaosa militado en Ĉinio. Sed la firma opono de la tibeta popolo kaj patriotoj de diversaj rondoj de Tibeto fiaskigis la intrigojn de la imperiistoj. Tiam la centra registaro de Ĉinio ankoraŭ tenis regantan pozicion super la tibeta registaro. La renaskiĝo kaj instaliĝo de la nuna Dekkvara Dalaj-lamao estis konfirmitaj de la centra registaro laŭ la tradiciaj ritoj, kaj la ceremonion prezidis komisiito de la centra registaro. Kvankam en la unua duono de la 20-a jarcento okazis malagrablajoj al la interrilatoj de Tibeto kaj la patrolando, tamen ĝi ĉiam restis en la teritorio de Ĉinio. Nun ankoraŭ kelkaj eksterlandanoj asertis, ke Tibeto estas suverena ŝtato, tio montris iliajn mankojn de minimuma aboco pri la historio aŭ distordon de ĝi.

REVIVIĜO DE TIBETO

La 1-an de oktobro de 1949 fondiĝis la Ĉina Popola Respubliko. La 23-an de majo de 1951, post intertraktado, reprezentantoj de la tibeta registaro kaj centra popola registaro subskribis la «Interkonsenton de la Centra Popola Registaro kaj la Tibeta Loka Registaro pri Paca Liberigo de Tibeto». En 1959 okazis demokratia reformado al Tibeto, kio emancipis la servutulojn kaj sklavojn okupantajn pli ol 95 procentojn de la tuta tibeta loĝantaro. La reformado metis finon al la feŭda servuta sistemo daŭrinta pli ol mil jarojn. Tibeto eniris en novan etapon, kaj rapide progre-

La steleo pri renkontiĝo de "onklo kaj nevo" antaŭ la templo Zulakang en Lhasa

Foto de MA GINGCIŬ




sis ĝiaj ekonomio kaj kulturo. En septembro de 1965 stariĝis la Tibeta Aŭtonoma Regiono. Tibetnacieco ĝuas plenan rajton de nacia aŭtonomeco en la granda nacia familio de Ĉinio.

La partikularaj naturaj kondiĉoj kaj la longedaŭra servuta sistemo profunde dronigis la ekonomion kaj kulturon de Tibeto en staton de postĝinteco kaj malklereco. La centra popola registaro kaj la frataj naciecoj donis grandan helpon. De 1952 ĝis 1984, la centra registaro subvenciis Tibeton per 7.79 miliardoj da jŭanoj (ĉ. 2.5 jŭanoj egalas al unu us. dolaro), kaj speciale investis miliardon da jŭanoj. Oni portis en Tibeton milionojn kaj milionojn da tunoj da materialoj kaj vivnecesaĵoj; dekmiloj da instruistoj, kuracistoj, sciencistoj kaj teknikistoj iris en Tibeton por helpi la lokanojn en progresigo de ekonomio kaj kulturo. Dank' al la kuna klopodado de tibetanoj kaj hanoj, la brutobredado, agrikulturo, industrio, edukado, higieno kaj scienca esplorado rimarkinde disvolviĝis, kaj la progreso en la lastaj pli ol 30 jaroj multe superis tiun en la antaŭaj kelkaj jarcentoj. En 1982 la totala produktovalor de industrio kaj agrikulturo de la tuta Tibeto atingis 742 milionojn da jŭanoj, kio estis trioblo de tiu de 1952 (kalkulate laŭ la senŝanĝa prezo de 1980). La jara meznombra enspezo de kamparanoj kaj paŝtistoj atingis 220 jŭanojn. La maksimumaj kondiĉoj de vivo por la tibetanoj estis garantiitaj.

Por plej rapide ŝanĝi la postĝintan fizionomion de Tibeto kaj riĉigi la popolon, la sekretariejo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio okazigis en 1980 kaj 1984 labor-kunsendojn pri Tibeto, en kiuj ĝi ellaboris serion da specialaj politikoj celantaj malpezigi la ŝarĝon de la popolo kaj disvolvi la ekonomion. Tibeto eniris en novan etapon de disvolviĝo. Nova Tibeto unuiĝa, riĉa kaj civilizacia baldaŭ aperos sur la monda tegmento.

La Blanka Pagodo en
Gjaze
de LIŬ TJESENG



Nord-Tibeta herbejo en mateno
de LIŬ TJESENG






Himalajo kun sia plej alta pinto Ĉomolangma

de SUN JIFU



Statuoj de Sunzamkam-
po kaj princino Ŭen-
ĉeng

de MA ĜINGĈIŬ



Tibetaj knabinoj

de LIŬ TJEŜENG



Religia aktivado de
tibetanoj

de LIŬ TJEŜENG

DING-O

de CENG CINHŪA



La bronza ding-o Simuu, 133 cm. alta kaj 875 kg. peza, farita en Ŝang-dinastio (16-a — 11-a jc. a.K.)

DING-O estas speco de kuirilo de la antikva Ĉinio, simila al nuna poto kaj uzata por kuiri aŭ konservi manĝaĵon, en formo de kubo aŭ sfero, kun tri aŭ kvar piedoj kaj du teniloj.

En la neolitiko antaŭ ses mil jaroj homoj de la primitiva socio malkovris, ke argila poto kun aldonitaj tri piedoj povas firme stari kaj faciligas kuiradon de manĝaĵo. Jen argila ding-o aperinta plej frue en Ĉinio. En Ŝang-dinastio en la 16-a ĝis la 11-a jc. a.K. Ĉinio eniris en prosperan bronzan epokon. Tiam aperis eleganta bronza ding-o, kaj poste ding-oj fera, porcelana, jada kaj lakita.

En la sklava socio la diversaj ranguloj, de la plej alta suvereno ĝis la subaj oficistoj, ĝuis malsamajn specojn de viandmanĝaĵo, tial la nombro de iliaj ding-oj por konservi manĝaĵon nature estis malsama. Kiel oni notis, reĝo uzis naŭ ding-ojn por konservi bovafon, ŝafafon, porkafon, sekigitan viandon, freŝan fiŝon, peklaĵon k.a.; princo uzis sep; ministro kvin kaj suba oficisto nur tri. Poste la bronza ding-o fariĝis simbolo de potenco kaj servis por ceremonio. Naŭ ding-oj reprezentis la tronon. En la 11-a

jarcento a.K. reĝo U de Ĝou-dinastio pereigis Ŝang-dinastion kaj ricevis naŭ ding-ojn, kaj post tio lia filo, reĝo Ĉeng, transportigis la naŭ ding-ojn al la ĉefurbo Gaŭĝing (nun Ĉang'an-gubernio de Ŝenŝji-provinco) kaj okazigis solenan ceremonion speciale por fiksi la ding-ojn. De tiam fiksi ding-ojn signifis fondiĝon de nova reĝimo.

En la jaro 255 a.K. reĝo Ĝaŭ de Ĉin-regno, pereiginte Ĝou-dinastion, transportigis la naŭ ding-ojn el Lŭojang kaj ilin subakvigis. Tion li faris ĉefe por neniigi la influon de Ĝou-dinastio kaj senigi ilin je la trona simbolo. Kaj plie, Ĉin-regno en la periodo de Militantaj Regnoj (475 a.K. — 221 a.K.) plifortigis leĝan sistemon kaj prenis reĝan jadsigelilon (politika potenco) kaj bronzan tigron (milita potenco) kiel la simbolon de potenco. De tiam utilis nur reĝa jadsigelilo ĉe kapto de ŝtata potenco aŭ transdono de trono.

La plej granda ding-o nun trovebla estas Simu'u-ding-o, kiu konserviĝas en la Muzeo de Ĉina Historio en Pekino kaj estas trovita en antikva tombaro de Anĵang, Henan-provinco en 1938. En ĝia interna flanko estas mul-

ditaj ideografiaĵoj "simu'u". Laŭ esploro, reĝo de Ŝang-dinastio uzis ĝin por kulti sian patrinon U. La ding-o en formo de skatolo estas pompa kaj bele ornamita, alta je 133 cm., larĝa je 78 cm., longa je 110 cm. kaj peza je 875 kg. En ĝia malsupra parto muldiĝas desegnoj de drako kaj alia fabela rabobesto sen korpo, kun kapo kaj du teruraj okuloj, kiuj esprimas teokratian penson. Sur la piedoj de la ding-o gravuriĝas simplaj desegnoj de cikadflugilo, kiuj donas pli da misteroj. Estas malfacilege fari tiel grandan ding-on. Tio markis altan nivelon de farado de bronzaĵoj en Ŝang-dinastio.

Sur bronzaĵaj ding-oj estas multaj aŭ gravuritaj ideografiaĵoj pri kultoj, instrukcioj, militaj meritoj, premioj, ĵuroj kaj kontraktoj faritaj de sklavoposedantoj. Nun la plej longa epigrafo kun 499 ideografiaĵoj en 36 linioj videblas sur la ding-o Maŭgong de la malfrua periodo de la Okcidenta Ĝou-dinastio. Tiu epigrafo povas ripari mankon de historiaj verkoj. Dank' al la evoluo de ideografiaĵoj, la epigrafoj de diversaj periodoj servas kiel valoraj materialoj por studi pri la disvolviĝo de ĉinaj ideografiaĵoj.

Bronza Ĝin-dingo, 62 cm. alta kaj 41.5 kg. peza, kiu estis farita en la periodo de la Okcidenta Ĝou-dinastio (la 11-a jarcento a. K.)



Glazurita porcelana dingo, 20.1 cm. alta, kiu estis farita en la periodo de Militantaj Regnoj (475—221 a.K.).



Bronza Ĉajhoŭ-dingo, 41.5 cm. alta, kiu estis farita en la periodo de Printempo kaj Aŭtuno (770—476 a.K.)



Eksperimentado de “ekologia agrikulturo”

VETURINTE 28 kilometrojn suden de Pekino, mi venis al la eksperimenta bazloko de la ekologia agrikulturo Liŭminjing en la gubernio Daŝing. Unue frapis miajn okulojn la duetaĝa porka-koka stalo antaŭ ĉiu kamparana loĝdomo. La kokoj brediĝas en la supra etaĝo kaj la porkoj en la malsupra. Tia nekutima stalo tuj altiris mian atenton.

“Kian rilaton tio havas al la ekologia agrikulturo?” mi demandis s-ron Bjan, kiu respondacas tie pri la esplorado de la ekologia agrikulturo.

“Unu el la karakterizaĵoj kaj bazaj taskoj de la ekologia agrikulturo estas akceli ripetfojan

aperadon de materio kaj ĝian cirkulan utiligon en la ekologia sistemo kaj altigi la utiligatan procentaĵon de sunenergio kaj la transforman procentaĵon de bioenergio en la kontinuelo kaj plurtavola spaco. Kuna bredado de porkoj kaj kokoj estas konsistiga parto de la ekologia agrikulturo en la bazloko. Tie oni uzas kokofekaĵon kiel nutraĵon de porkoj.” Rakontante, li kondukis min antaŭ porka-kokan stalon de iu kamparano. Tiam mi vidis, ke la fekaĵo de la kokoj povas fali de supre malsupren kaj servas kiel nutraĵo de porkoj.


Kiel fekaĵo povas servi kiel bruta nutraĵo? Antaŭ ol mi faris

la demandon, kamparana teknikisto de la brigado Ĝang Kujĉeng klarigis: “Ekskremento de iuspeca animalo ofte povas esti uzata kiel nutraĵo de alispeca animalo. Ĉar la animaloj ĝenerale digestas nur dekonon da proteino en la prenitita manĝaĵo. La digesta kanalo de koko estas mallonga kaj havas malfortan asimilan povon, tial la fekaĵo entenas grandan kvanton da proteino kaj estas bona nutraĵo por porkoj.” Li diris, ke tute ne fetoras la kokfekaĵo fermentigita per seka laktacido. Ĝi, miksitita kun aliaj nutraĵoj, estas ideala nutraĵo por porkoj kaj ankaŭ por laktobovoj. Tio povas ne nur ŝpari 50% de la de-



Duetaĝa porka-koka stalo

likata nutraĵo, sed ankaŭ kreskigi al porkoj pli da malgrasa viando. La porka fekaĵo, same kiel tiu en necesejo de ĉiu kamparana familio, fluas en ties metanan basenon, kaj produktas metanon por kuirado kaj lumigado. La restaĵo kaj akvo en la baseno estas bona sterko por kulturi florojn kaj legomojn. La legomaj folioj povas esti uzataj kiel nutraĵo por kokoj kaj kunikloj. Tiel formiĝas malgranda cirkula sistemo: koko (kuniklo) — porko — metano — legomo (floro). La kamparanoj nomas ĝin ekologia cirkula sistemo en kamparana korto.



Skizo de la ekologia cirkula sistemo en kamparana korto

Mi eniris kamparanan korton, en kiu staris sunenergia forno. La mastro montris al ni sian metanan basenon. Oni diris, ke dank' al aplikado de metano, en la vilaĝo ĝenerale solviĝis la problemo pri hejtaĵo. Tiu tago estis ĝuste la tradicia Drakboata Festo de Ĉinio. Por festi la tagon la mastro preparis kaldronon da *zongzioj* (manĝaĵo el glueca rizo, kun jujuboj kiel farĉo kaj envolvita en fragmitaj aŭ bambuaj folioj), tial en la ĉambro bonodoris fragmitaj folioj kaj blueca rizo. Ni sidiĝis en sofo kaj babilis pri la vivo en la lastaj jaroj. Mi informiĝis, ke dank' al disvolvado de la ekologia agrikulturo en malpli ol du jaroj, la pokapa enspezo en la vilaĝo jam atingis 450 jŭanojn je 10% pli multe ol tiu en 1982. Nun ĉiu kamparana familio provizis sin per televidilo, lavaŝino kaj elektra ventumilo, kiuj malofte vidiĝis antaŭe en la kamparo.

La ekologia cirkula sistemo en kamparana korto estas nur tre malgranda branĉo, dum la tuta ekologia agrikulturo de la brigado disvolviĝas pli vaste kaj rapide.

Montrante la ondantajn rizon kaj tritikon en la kampoj, s-ro Bjan diris al mi: "Ni ĉiujare rice-

vas, krom greno, ankaŭ grandan kvanton da tigoj. En la pasinteco plejparto de la tigoj estis uzata kiel hejtaĵo; eĉ se parto estis uzata kiel sterko, ĝi ja havis tro maltan utiligatan procentaĵon. Sed kortobirdoj kaj brutoj manĝas malmultvalorajn herbojn kaj tigojn kaj liveras altvalorajn ovon, viandon, felon kaj lanon. Krome, la kortobirda kaj bruta ekskremento kiel organika sterko povas multe fekundigi la grundon. Post kiam la tigoj estis muelitaj en la stomako de brutoj kaj redonita al kampoj, la utiligita procentaĵo de ĝia proteino povas atingi 90%."

Poste mi venis al la grenaj prilaborejoj de la brigado. Ĝi provizas 120 viand-bovojn kaj 20 laktobovinojn per branoj kaj dispecigitaj tigoj kiel furaĝo. La ekskremento de tiuj brutoj kaj parto da tigoj estas uzataj kiel krudmaterialo por metana baseno kaj la

produktita metano estas uzata por disvolvi industrion kaj aliajn produktojn. La restaĵo kaj akvo en la baseno estas transportita al fiŝlagetoj, legomaj kampoj, lotusradikaj lagetoj kiel nutraĵo kaj sterko aŭ al furaĝo-prilaborejo. Kaj la fiŝlageta koto estas transportita al kampoj, fruktoĝardenoj, legomaj kampoj kiel sterko. Tiamaniere ili estas plene utiligataj.

La mastro diris, ke la ekologia agrikulturo ne nur povas pliprodukti grenon kaj plene utiligi naturajn riĉfontojn, sed ankaŭ havas aliajn ekonomiajn kaj ekologiajn bonojn: Metano ŝparas hejtaĵon, kio utilas al verdigo kaj grunda akvokonservado; metano pliigas organikan sterkon kaj ŝparas kemisterkon, kio reduktas la konsumon de minerala energio kaj polucion kaj tiel protektas la medion. En la pasinteco oni ri-

gardis la agrikulturan modernigon nur kiel mekanizon, ĝeneralan aplikadon de kemisterko, kampirigaciadon . . . Ĉiujare la aĉeto de kemisterko okupis duonon de la tuta elspezo de la brigado, tial la kamparanoj ne povis pliigi sian enspezon eĉ en riĉrikolta jaro. Krome, la troa uzado de kemisterko kaŭzis certgrade grundan malmoliĝon kaj reduktiĝon de la organika substanco en la grundo kaj sekve estiĝis media polucio, damaĝiĝis naturaj riĉfontoj kaj aperis superflujaj laborfortoj.

La eksperimentado de la ekologia agrikulturo de la brigado Liŭminjing estas en sia komenco, tamen ĝi jam rikoltis bonan efikon. En 1983, dank' al pliigo de organika sterko, la kemisterka kvanto uzita en ĉiu hektaro malmpliĝis je 225 kg., per tio la brigado ŝparis 10 000 jŭanojn. La lasttempa mezurado montris, ke la entena kvanto de la organika substanco en la grundo pliĝis je 0.5% kaj la malmola grundo iom post iom malkompaktiĝas. La unuopa produkta strukturo kaj simpla ekologia cirkulado estis ŝanĝitaj kaj formiĝis ĉirkulado de pluraj specoj de materio kaj ekologia strukturo de ripetada utiligo, kio plibonigis la tutan ekologian staton kaj median kvaliton. La metana fermentado povas mortigi 90 procentojn da kojlobaciloj, tial la intestaj infektaj malsanoj ne plu cirkulas en somero.

En Liŭminjing mi vidis la belan perspektivon de la ĉina agrikulturo.



KORESPONDI DEZIRAS


Tarifo: 1 internacia respondkupono por 5 vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: 1 interna. resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp. organizoj povas senpage aperi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili. Bonvolu sendi la intern. resp. kup. nepre rekte al EPC-redakcio, P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio.

Brazila inflacio 200% pereigas inĝenierartan finstudon de mia diligenta filo Nej Rikardo. Bv. stipendii per 2000 dolaroj kondiĉe ke li mem raportu ĉiun trian monaton pri sia progreso en flua Es-

peranto. Antaŭdanke certigas respondon al ĉiu propono: George Otto Vaske, Rua Esperanto, sno 95.760 Kai/RS, Brazilo.

- * Mi deziras korespondi kun geamikoj el Ĉinio kaj tutmonde pri poŝtmarkoj, moneroj kaj fervojo. Mia adreso: Pyla Andrzej (55-jara edzo), 42-600 Tanrnowskie Gory, ul. Jozefa Cebuli 8 B m.l, Pollando.
- * Esperanto-Kurso baldaŭ funkcios. Leteroj el la tuta mondo estos bonvenaj por kuraĝigi novajn gelernantojn. M.J.C., F 95310 Saint Ouen L'aumone, Francio.
- * Vladimir Jurganov (Sovetio, Novosibirsk 101, 2-j Trikotajnij per., 18) korespondus kun Ĉinio kaj tutmondo pri literaturo, muziko, kutimoj de popoloj, psikologio de inventado.
- * 25-j. f-ino vol. kor. tutmonde pri naturo, foto, kutimoj kaj ĉiutaga vivo. Ewa Parys, ul. Sobieskiego 29, 42-750 Kalety, Pollando.

LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO



- | | |
|------------------|------------------|
| 1. Ĉongĉing (p4) | 5. Sanhajo (p49) |
| 2. Jantaj (p18) | 6. Junnan (p67) |
| 3. Pekino (p33) | 7. Luŝan (p67) |
| 4. Tibeto (p57) | |

**LA UNUA ĈINA TAĈMENTO
POR ESPLORADO DE LA
SUDA POLUSO**

La unua ĉina taĉmento por esplorado de la suda poluso oficiale fondiĝis en la 18-a de oktobro 1984 kaj jam komencis trejniĝon. Antaŭ tio ĉinaj sciencistoj plurfoje esploris tiun lokon kune kun eksterlandaj sciencistoj.

La taĉmento havas 50 membrojn, kiuj venis el departementoj konstrua, komunika, elektroenergia, mezura kaj desegna, meteorologia, oceanologia kaj geologia. La taĉmentanoj starigos la unuan someran sciencesploran stacion de Ĉinio en la suda poluso kaj faros tie esplorojn meteorologian, geologian, geomorfologian kaj biologian.

**MODERNAJ AŬTOVOJOJ
KONSTRUOTAJ EN ĈINIO**

En venontaj jaroj Ĉinio konstruos nombron da modernaj aŭtovojoj por mildigi la trafikan streĉecon.

Nun oni jam finis la projekton de la Pekin-Tjanĝin-Tanggu-a Aŭtovojo kaj baldaŭ komencos ĝian konstruadon. La Gŭangdong-provinca Ŝose-konstrua Kompanio jam kontraktis kun la Hehe-a Ĉina

Disvolva Limigita Kompanio de Hongkong pri konstruado de la Senĝen-Kanton-Ĝuhaj-a Aŭtovojo. Ankaŭ la provincoj Ljaŭning kaj Ŝandong kaj la urbo Ŝanhajo faras preparan laboron por konstrui modernajn aŭtovojojn.

**NOVA GEOTERMIKA
KAMPO EKSPLOATATA**

La geotermika kampo de Langĝiŭ en Ali-subregiono de okcidenta Tibeto nun estas ekspluatata. Ĝi estas la dua geotermika kampo trovita en Tibeto.

La nova geotermika kampo kun dekoj da termofontaj aperturoj kovras areon de 0.5 kvadrata kilometro. La akva temperaturo atingas 78°C kaj ĝi leviĝas je 1.2°C post ĉiometra profunda fosado. La termofluo produktas 6 000 kilokaloriojn da varmo ĉiusekunde kaj povas liveriĝi al generatoro kun kapacito de 7 000 kilovattoj.

La Geotermika Elektrejo de Langĝiŭ produktos sufiĉan elektron por la ĉirkaŭaj urbetoj.

La tera varmo estas grava energi-fonto por Tibeto, kaj ĝia rezervekvanto okupas la unuan lokon en Ĉinio. Ĝis nun en Tibeto estis trovitaj pli ol 600 geotermikaj rezervejoj.

**NOVA GRANDA BONKVALITA
KARBOKAMPO EN
NORDA ŜENŜJI**

Laŭ prospektorado en la lastaj ses jaroj oni trovis grandan karbokampon en norda Ŝenŝji-provinco. La karbotavoloj tuj sur la tersurfaco en la basenoj de Ulanmulun kaj aliaj riveroj dikas je 7-8 metroj. Oni vidos vastan karbokampon, se oni formovos en iuj lokoj maldikan tavolon da sablo kaj gruzo sur ĝi. En la gubernioj Ŝenmu kaj Fugu la esplorita rezervekvanto estas pli ol dekoj da miliardoj da tunoj. Kun disvolvo de esplorado oni trovis novajn karborezervojn en norda Ŝenŝji-provinco. La provinco abundas je bonkvalita karbo, kuŝanta malprofunde sub la tero facile ekspluetebla kaj simpla en geologia strukturo.

**LA ĈINA-JAPANA
AMIKECA HOSPITALO
EKfunkcias EN PEKINO**

La Ĉina-Japana Amikeca Hospitalo starigita en norda Pekino komencis akcepti pacientojn lastatempe.

La hospitalo estis konstruita de Ĉinio per 16.4 miliardoj da enoj donacitaj de la japana registaro kiel investaĵo. La konstruado komenciĝis en 1982.

La hospitalo konsistas el 13 domoj kun areo de 83 000 kvadrataj metroj. Ĝi havas 1 300 mal-sanulajn kaj sanatoriajn litojn, unu medicinan instituton kaj unu higienan lernejon.

En la hospitalo funkcias 23 okcident-kaj 14 ĉin-medicinaj sekcioj, inkluzive tiujn de interna medicino, ĥirurgio, pediatrio, masaĝo kaj akupunkturo. Ĝiaj avangardaj ekipaĵoj estis importitaj el Japanio.

**REKONSTRUOTA LA RUINA
GARDENO JŬANMINGJŬAN**

Kampanoj de Hajdjan-distrikto de Pekino investis 500 000 jŭanojn

Karbotavolo ĉe riverbordo en Senmu-gubernio



por rekonstrui la Ĝardenon Jüanmingjüan. Ankaŭ la pekina magistrato donos monhelpon. La ĝardeno estis prirabita kaj bruligita de la brita-franca alianca armeo en 1860.

Laŭ projekto oni tie rekonstruos la pavilonon Pengdaŭ Jaŭtaj, unu el la ĉefaj konstruaĵoj de Jüanmingjüan, dragos la lagon "Feliĉa Maro" kun areo de 28 hektaroj, konstruos sep pontojn kaj 2 500-metran vojon ĉirkaŭ la lago, riparos la monton, pligrandigos verdigitan areon kaj starigos diversajn servajn instalaĵojn.

Post du jaroj la areo de la pitoreskejo kreskos al 200 hektaroj. Jüanmingjüan estis ekkonstruita en 1709 kaj finkonstruita en 1772. Ĝi estis imperiestra ĝardeno kaj laŭdata kiel modelo de la monda ĝardena arkitekturo.

GRANDA INTERNACIA AMUZEJO KONSTRUATA EN PEKINO

Lastatempe Ĉinio komencis konstrui sian plej grandan internacian amuzejon en Mijun-gubernio, Pe-



La Ĉina-Japana Amikeca Hospitalo

kino. Tio plenumiĝos en la fino de junio ĉi-jare.

La internacia amuzejo kun areo de pli ol 40 hektaroj en la nord-orienta antaŭurbo de Pekino estas parto de la nun konstruata Bajhe-parko en Mijun-gubernio.

Laŭ plano la amuzejo estos ekipita per diversaj grandaj distraj instalaĵoj.

PREĜEJO DE LA ORTODOKSA EKLEZIO REMALFERMITA EN HARBIN

Preĝejo de la Ortodoksa Eklezio post riparo remalfermiĝis en Harbin, la ĉefurbo de Hejlongĝjang-provinco. Pli ol 50 ortodoksuloj ĉeestis la eklezian aktivadon deĵoritan de sacerdotoj Gu Ŝipu kaj Du Lifu antaŭtagmeze de la 14-a de oktobro 1984.

La preĝejo konstruita en 1936 situas en la urbocentro.

BELGA VIOLONISTINO LOLA BOBESCO EN PEKINO

En la fino de oktobro lastajare fama belga violonistino Lola Bobesco vizitis Pekinon kaj faris du prezentaĵojn akompanate de la orkestro de la Centra Operejo. Ŝi ludis "Violonan Konĉerton en D Majora" de J. Brahms sub la direktado de direktistino Geng Ŝjaŭjing kaj ricevis varman aplaŭdon de la aŭskultantoj.

Geng Ŝjaŭjing gratulas s-inon Lola Bobesco pro ŝia bona prezentaĵo.



Ekonomia prosperiĝo en la azia kaj pacifika regiono


DE la lastaj jaroj la ekonomio en la regiono de Azio kaj Pacifiko, precipe en la okcidenta pacifika regiono, plej rapide disvolviĝas en la mondo. Koncernaj materialoj montris, ke inter 1960-1980 ĝia jara produkta valoro meznombro pliiĝis je 8%, dum tiu de Usono — je 3.5% kaj tiu de Eŭropo — je 4.5%. Kaj tiel en la pasintaj 20 jaroj duoble pligrandiĝis la ekonomia procentaĵo de la regiono en la totala produktovaloro de la mondo. Inter 1980 — 1983 la ekonomio de la mondo kreskis meznombro je 1.4% ĉiujare, dum tiu de la okcidenta pacifika regiono je 4%. Ke la ekonomia centro de la mondo sin movas al la regiono de Azio kaj Pacifiko, tio estas multe traktata internacie. La ekonomia prosperiĝo de la regiono de Azio kaj Pacifiko estas okulfrappe atentaltira.

La rapida disvolviĝo de la ekonomio en la regiono de Azio kaj Pacifiko montriĝas ĉefe en sudorienta Azio kaj Japanio kaj aliaj landoj de orienta Azio. Japanio, kiu estis grave detruita en la Dua Mondmilito, nun fariĝis la tria ekonomia potenco en la mondo, post Usono kaj Sovetunio. La de ĝi produktitaj aŭtoj, televidiloj, komputeroj kaj aliaj elektronikaj produktaĵoj torentas al Usono kaj okcidenta Eŭropo. Antaŭ la mezo de la 70-aj jaroj la nove leviĝantaj industriaj landoj kaj regionoj, kiaj la Suda Koreio, Singapuro, Hongkong, Tajŭan de Ĉinio kaj aliaj, profitante de

la supereco en la malmultekosta laboro, disvolvis tekstiladon kaj poreksportan kaj prilaboran industrian, kiujn entreprenas pli da laborfortoj. Por adaptiĝi al la en-kaj eksterlanda ŝanĝiĝo en ekonomia situacio, en la lastaj dek jaroj ili faris reguligon kaj plialtigon de la ekonomia strukturo, pli rapide disvolvis poreksportan

kaj prilaboran industrian de elektroniko, precizaj aparatoj, aŭtoj, ŝipoj, ŝtaloj k.a., kiuj bezonas pli multe da kapitalo kaj postulas pli altajn teknikojn. Iliaj produktaĵoj ne nur vendiĝis en la merkatoj de disvolviĝantaj landoj, sed ankaŭ rapide pligrandiĝis sian vendkvanton en la merkatoj de evoluintaj landoj. La

La altforno n-ro 1 de la Baŭsan-a Generala Ŝtala Fabriko de Sanhajo





Kolora televidilo kun malgranda ekranaro farita de Japanio

membrolandoj de la Asocio de Sudorient-Aziaj Landoj, escepte de Singapuro, ekonomie impetis malpli rapide ol la supre menciitaj landoj kaj regionoj, sed en la lastaj dek jaroj ili plirapidigis siajn paŝojn en industriigo kaj atingis iujn sukcesojn en la tekstilado, elektronika industrio k.a. Oni asertis, ke tiuj landoj baldaŭ fariĝos evoluintaj industriaj landoj.

La rapida disvolviĝo de la ekonomio en la regiono de Azio kaj Pacifiko rezultis el tio, ke en la lastaj 10 jaroj tiuj landoj kaj regionoj disvolvis eksportan kaj prilaboran industrion por internacia merkato, kaj tio akcelis la ekonomian disvolviĝon. La statistiko montris, ke en la pasintaj 20 jaroj la jara meznombra kresko de ilia eksporta komerco estis pli alta ol tiu de la mondo, kio plurobligis la proporciojn de ilia komerca kvanto en la totala kvanto de la monda komerco. Kun la rapida disvolviĝo de la ekonomio kaj komerco, la regiono de Azio kaj Pacifiko jam fariĝis

ĉefa komercanto por Usono anstataŭ la okcidenta Eŭropo. En 1980 la komerca kvanto inter tiu regiono kaj Usono unuafoje superis tiun inter ambaŭ bordoj de Atlantiko, kaj poste rapide grandiĝis la diferenco. Ĝi kreskis de du miliardoj da usonaj dolaroj en 1980 ĝis 29 miliardoj da usonaj dolaroj en 1983. Iuj usonanoj opiniis, ke la transmoviĝo de la monda komerca centro estas pli grava ol tiu de la mediteraneaj bordoj al la atlantikaj bordoj okazinta antaŭ 500 jaroj.

La produktaĵoj de multaj landoj kaj regionoj en la regiono de Azio kaj Pacifiko havas stabilan kaj ĉiam pli grandan debiton en la internacia merkato, kio rezultis el tio, ke dum longa tempo ili donis grandan atenton al la studo, disvolvo, enkonduko kaj aplikado de novaj teknikoj. En la lastaj 20 jaroj Japanio rapide superis la okcident-eŭropajn landojn en la disvolvado kaj aplikado de novaj sciencoj kaj teknikoj en multaj kampoj. Preskaŭ en la sama tempo nove leviĝantaj industriaj

landoj kaj regionoj de orienta kaj sudorienta Azio senĉese plifortigis la ekspluatadon de homaj riĉfontoj, enkondukon kaj kreadon de novaj teknikoj, rapidigis la transiradon de la kampo de la poreksporta kaj prilabora industrio al tiu bezonanta multajn teknikojn kaj sciojn. En la forta konkurenco pri aplikado de teknikoj en la landoj de Azio kaj Pacifiko, la okcidenteŭropaj landoj iom post iom perdis avantaĝajn poziciojn en iuj siaj tradiciaj kampoj. Meze de la 70-aj jaroj la malalt-prezaj teksaĵoj de Tajŭan, Hongkong, Singapuro kaj la Suda Koreio invadis la okcident-eŭropan merkaton. Nun pli ol 60% de la totalaj toneloj de la ŝipoj en la mondo produktiĝas de la landoj kaj regionoj de Pacifiko, inter ili Japanio kaj la Suda Koreio okupas la unuan kaj duan lokojn respektive en la ŝipkonstruado de la mondo.

Oni antaŭvidis, ke en la fino de la kuranta jarcento la pacifika regiono anstataŭos la atlantikan regionon kaj fariĝos la ekonomia

centro de la mondo. Tio baziĝas sur la jeno:

Unue, kompare forta bazo por disvolvi ekonomion. Post disvolviĝo dum la pasintaj 10-20 jaroj ĉiuj landoj en la azia kaj pacifika regiono havigis al si kompare grandajn ekonomiajn fortojn, el ili multaj disvolviĝantaj landoj bone solvis la problemon de ŝuldo, ĝuas krediton kaj povas facile gajni pruntedonitan monon de la internaciaj financaj organizoj, kio kreas favorajn kondiĉojn teknikajn kaj financajn por plua disvolviĝo. Aliflanke la riĉaj naturaj kaj homaj riĉfontoj en tiu regiono metas solidan bazon al la estonta disvolviĝo. En la azia kaj pacifika regiono vivas duono de la loĝantoj de la mondo. La plej grandaj produktoj de 11 el la 19 valoraj krudmaterialoj de la mondo dislokiĝas en tiu regiono kaj la senĉesa leviĝo de la aĉetpovo de la loĝantoj forte akcelas la investadon kaj varan komercadon de tiu regiono.

Due, ekonomia kunlaboro kaj disvolvo de la latentaj fortoj interne de la regiono. La totala produktovaloro de Usono kaj Japa-

nio konsistigas 1/3 de tiu de la mondo kaj la totala komerca kvanto de ambaŭ landoj konsistigas 1/5 de tiu en la mondo. Samtempe, en la lastaj jaroj pli kaj pli oftigis la ekonomia interŝanĝo interne de la regiono. La komerca kresko interne de ĝi akiris rimarkindan sukceson. Tial la harmonia kunlaboro de la landoj interne de tiu regiono utilos al la formiĝo de la pacifika ekonomia centro.

Aliflanke tiuj nove leviĝantaj industriaj landoj kaj regionoj havas kompare malkarajn lertajn laborfortojn kaj superecon por disvolvi kaj apliki novajn teknikojn kaj ĝustatempe reguligi kaj altigi la ekonomian strukturon.


Trie, la ekonomia prosperiĝo de Ĉinio. Ĉinio estas granda lando kun gigantaj ekonomiaj latentaj fortoj por daŭra disvolviĝo. Ekde la jarfino de 1978 la ĉina nacia ekonomio suriris la vojon de stabila disvolviĝo. Oni antaŭdiris, ke en la lasta duono de la 80-aj jaroj ĝia ekonomio certe kreskos pli rapide, en la lasta jardeko de la kuranta jarcento Ĉinio eniros en la periodon de nova ekonomia prosperiĝo. La ekono-

mia leviĝo de Ĉinio, la plifortiĝo de la ekonomia kunlaboro inter Ĉinio kaj Japanio, inter Ĉinio kaj Usono kaj inter Ĉinio kaj sudorient-aziaj landoj forte akcelos la formiĝon de la pacifika ekonomia centro.

Kvare, grandega forto de la nova teknika revolucio. Nun Usono kaj Japanio estas avangardaj en multaj sciencaj kaj teknikaj kampoj de la mondo. Ekz., Usono kaj Japanio havas 9 el la 10 manufakturoj de integra cirkvito en la mondo. Samtempe Ĉinio, multaj landoj kaj regionoj de orienta Azio kaj la Asocio de Sudorient-Aziaj Landoj plifortigas studadon kaj aplikadon de novaj teknikoj kaj rikoltis certan efikon.

La faktoj de la ekonomia disvolviĝo en la regiono de Azio kaj Pacifiko montris, ke la transmoviĝo de la ekonomia centro de la mondo jam fariĝis nerevenebla historia tendenco. Multaj politikaj kaj ekonomikaj personoj en la mondo opinias, ke daŭros la rapida ekonomia kresko de la regiono de Azio kaj Pacifiko kaj la 21-a jc. estos la "epoko de Pacifiko".

Avangarda tekniko akcelas disvolviĝon de la ĉina ekonomio. La foto montras regadejon de komputero.



LA BAVARIA ŜTATA OPERTRUPO DE FR GERMANIO EN ĈINIO

Fotoj de CAJ HAJFENG






Sceno el la opero "La Nupto de Figaro"



En la renkontiĝo

Wolfgang Sawallisch, direktisto de la orkestro






Sceno el la opero "Magia Fluto"



*En la Imperiestra
Palaco de Pekino*

*La artistoj en Pe-
kino*

*La artistoj de la Bavaria Ŝtata Opertrupo kaj la
Centra Opera Teatro okazigas gajan renkontiĝon.*



EPĈ SALUTAS VIN

ĈE la sojlo de 1985, pĕre de tiu ĉi numero, ni sendas varmajn salutojn kaj bondezirojn por la Novjaro al vi, niaj legantoj, kontribuantoj, perantoj kaj ĉiuj aliaj amikoj, kiuj interesiĝas pri nia gazeto.

Koran dankon al tiuj, kiuj dum la pasintaj kelkaj jaroj letere prezentis al ni rimarkigojn kaj proponojn por plibonigi nian gazeton. Tiuj proponoj estis plejparte akceptitaj, kaj klopodojn ni faris, kiel ni povis. Bedaŭrinde, pro financaj kaj teknikaj kaŭzoj, ĝis nun ni ne povis kontentigi la postulon plialtigi la pres-kvaliton de niaj fotoj kaj desegnaĵoj en tekstoj. Nun, post nia strebado, ni decidis, ke ekde tiu ĉi numero ĉiuj tekstoj kaj ilustraĵoj en EPĈ estos intajle presitaj. Kvankam tio postulos de ni pli da elspezo, niaj ilustraĵoj verŝajne pli bone efektos. Pardonon ni petas, se vi ricevus tiun ĉi numeron iom malfrue pro la ŝanĝo de pres-maniero.

Kiel konate, la 71-a UK okazos en Pekino en 1986. Por helpi diverslandajn kongresanojn viziti Ĉinion dum la kongreso, ekde tiu ĉi numero EPĈ laŭvice prezentos kelkajn vizitliniojn kaj la de ili trapasotajn urbojn. Tiuj vizitlinioj estas speciale preparitaj por dispono de niaj kongresanoj.

En la pasinta jaro EPĈ publikigis serion da raportoj pri la fama antikva konstruaĵo de Ĉinio — la Granda Muro. En 1985, ĝi sisteme prezentos al vi Tibeton sur “la tegmento de la mondo”, kiu vekas scivolemon ĉe multaj legantoj. La artikolo “Tibeto, la sudokcidenta limregiono de Ĉinio”

kun grupo da koloraj bildoj pri la loko en tiu ĉi numero servas kiel komenco de la nova serio.

La malferma politiko praktikata en Ĉinio estas fundamenta nacia politiko kaj, internacie, alte taksata. Krom la malfermitaj specialaj ekonomiaj distriktoj Ŝenĝen, Ĝuhaj, Ŝjamen kaj Ŝantoŭ, en 1984 Ĉinio decidis malfermi ankaŭ 14 marbordajn urbojn. Ankaŭ tiujn urbojn ni laŭvice prezentos en nia gazeto ekde tiu ĉi numero.

Kelkajn ŝanĝojn ni faros al la rubrikoj de EPĈ en 1985. Ĉar la prezentado pri la ĉina antikva historio jam finiĝis en la fino de 1984, la rubriko “5 000 jaroj de Ĉinio” ne plu aperos. Kaj anstataŭ “Mia vivo”, ni instalos la rubrikon “Nunaj ĉinoj” por prezenti al niaj legantoj la penson, idealon, laboron kaj vivon de ĉinoj en la 80-aj jaroj. Cetere, laŭ la peto de multaj legantoj EPĈ publikigos nombron da humuraĵoj, eseoj, proverboj ks.

En majo de 1985 estos la 35-a datreveno de la fondiĝo de EPĈ. Nombro da memorigaj artikoloj aperos en nia gazeto. Koncernaj kontribuantoj estas bonvenaj.

En la pasintaj kelkaj jaroj, sub la helpo de niaj legantoj kaj kontribuantoj, EPĈ faris klopodojn por sin plibonigi, sed al ĝi ne mankas mankoj. Ĝia enhavo ankoraŭ ne estas sufiĉe ampleksa kaj ne povas tute kontentigi la bezonon de legantoj. Ĝiaj stilo kaj bildoj ne estas sufiĉe viglaj. En la nova jaro, por altigi ĝian kvaliton, ni esperas, ke niaj legantoj daŭre prezentos al ni kritikojn kaj proponojn. Viaj kritikoj kaj proponoj ĉiam estas unu el la fortoj, kiuj puŝas nin antaŭen.

FOTOJ FARITAJ
DE E-ISTOJ

La sveda printempo
de **ULF RIBERS** (Svedio)

Sunleviĝo ĉe Mylestom
de **M. CHALDECOTT** (Aŭstralio)



815W

